

2

1971

8,—Ft

HUNGARA VIVO

E

DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA SUPER BENZINO 98.
EKSTRABENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN“

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo
de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

*

1971, XI-a jaro, 2-a numero

S. Szenes: Konfeso pri la patrio. Tr. J. Mátéffy 1
I. László: La hungaraj pioniroj de la tekniko 2
Géza Molnár: Ŝanoar. Tr. S. Szathmári.... 3
J. Szekeres: Panoramo 6
M. Ladányi: Poemoj. Tr. K. Kalocsay..... 8
Interesaj artikoletoj 8–9
I. Bácskai: Intervjuo kun la nova prezidanto de UIC 9
P. Morvai: Budapešta Internacia Foiro '71 10
M. Gergely: Károly Reich 12
K. Reich: Du desegnaĵoj 12–13
K. Jobbágy: Poemoj. Tr. P. Rados..... 12
Enhavtabelo de Hungara Vivo 1961–1970. Kompilis: L. Kökény 15–18
L. Tárkony: Revuo de revuoj..... 19
A. Münnich: Komputado kaj f'estonto de l'Int. Lingvo 20
J. Tóth: Kandidato antaŭ diplomo. Intervjuo 21
Jozefo Bata: Rememoraĵoj 22
„Paŝoj al plena posedo". Recenzo..... 22
Teatra kroniko (P. Avar kaj KVK) 24
K. Kalocsay: Plena ilustrita vortaro de esperanto 26
Leterkesto 26
L. Lesznai: La Tragedio del'homo – opero 27
T. Ujlaki-Nagy: Sporto 28
S. László Bencsik: Hungaroj en Azio. Tr. V. Szabó 28
Sz. Bálint: La konsiderema edziĝonto..... 29
El leteroj. Korepsondi deziras 30
Humuro 31
Kie oni povas aboni Hungaran Vivon?.... 31
FERI: Krucvortenigmo – Poeto al poeto 32
E. Fenyvesi: Edvin de Kock: Kvin Elementoj. Recenzo 32

Sur la kovrilpaĝo: Botela danco — foto de János Eifert

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan jaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224–819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

71.70822 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

Konfeso pri la patrio

Preskaŭ unu kaj duono da milionoj estas la nombro de la hungaroj, kiuj vivas en la mondo sporade, de Vieno ĝis Novjorko, de Kaburbo ĝis Alasko: ili elmigris, disidentis, neleĝe transpaŝis la landlimon, aŭ estas la idoj de la foririntoj, nun jam la dua kaj tria generacioj. Ili estas komplike tavoliĝintaj laŭ sia historio, pensmaniero, klasa situacio kaj moroj; ili estas — laŭ la vortoj de la poeto Gyula Illyés — la hungara „diasporo", kies anojn disigas unu de la alia grandaj distancoj geografiaj. Sed ilia ekzistado, kiel ajn malproksimen ili ĵetiĝis, reefikas inter la limojn de la patrujo, kaj kio hejme okazas, tio havas influon al ili vivantaj fore: preskaŭ ĉiu dua familio havas ja pli malpli proksimajn parencojn, kaj ilia plimulto flegas reciproke la interrilatojn.

La ĵus pasinta jubilea jaro — la 25-a datreveno de la liberiĝo de nia lando kaj la miljara jubileo de la naskotago de l'ŝtato-fonda reĝo Stefano — tiris hejmen samlandanojn, vivantajn eksterlande, ĝis nun plej grandnombre, proksimume centmilope.

Multaj hejmvizitintoj ankaŭ priskribis siajn impresojn kaj travivaĵojn kaj komunikis ilin al „Mondfederacio de Hungaroj" kaj al ties gazeto „Hungaraj Sciigoj", aŭ al hungara radio-dissendo nomata „Nia Naskotero". El tiuj skribaĵoj ni kompilis la sube legeblajn elektaĵojn. En ili parolas simplaj homoj, tamen el ili inundas konfeso de speciala forto: konfeso pri la patrio, pri la naskotero.

Dr-o Mihály Skubly, Usono: — Naskita en Ameriko, nun mi venis unuafoje Hungarlandon. Ne vane diris ĉiam mia patrino, ke ĝi estas fabela, belega lando. Estis bone, ke propraokule mi vidis: ne tiel estas, kiel al mi multaj rakontis. Mi ne trovis la homojn ĉifonvestitaj, nek malsataj, eĉ, ili estis vestitaj tiel same laŭmode, kiel en iu ajn metropolo. Ili rajtas fieri pri sia lando. Post du jaroj mi revenos, sed jam kun mia filino.

Illés Skallák, Brazilo: — Kiel ajn longe mi skribus, nur haste, rapsodie mi povus raporti pri miaj hejmaj travivaĵoj. Tro malmultaj estis tiuj tri monatoj, kiujn mi povis hejme pasigi helpe de „Mondfederacio de Hungaroj". Mi volas fari daŭran memoraĵon pri tiu tempo: mi verkos pri ĝi libron.

István Bánki, Usono: — Mi hontas, ke mi devas plendi. Pasis jam ses jaroj, de kiam mi venis ĉi tien al mia filo, je lia voko. Nun mi ne povas plu elteni. Jen estos la sesa Kristnasko, kiun mi pasigos for de mia patrujo. Bonvolu min sciigi, ĉu mi povos reveni, eĉ se mi foriris kun elmigra pasporto.

Violett Vári, Aŭstralio: — Se mi ne hontus mian neleĝan foriron, jam delonge, de tre longe mi estus hejme. Eble multaj ridos pri tio, sed mi scias, ke 90 procentoj de tiuj vivantaj ĉi tie sentas simile.

Zoltán Vértes, Usono: — Mi volus kune kun mia edzino definitive reveni Hungarlandon. Pasis jam 50 jaroj ekde mia foriro kaj ni deziras vivi niajn lastajn jarojn en la patrujo. Vi komprenas ja, ke ni sopiras je bela paca maljunaĝo.

Zoltán Bán, Kanado: — Hodiaŭ mi hazarde kaptis vian radiorespondon al iu via Angluja aŭskultanto; li demandis, ĉu li povos hej-

menveni; nome li restis sen permeso eksterlande antaŭ ses jaroj. Mi forlasis la patrujon preskaŭ antaŭ duonjarcento. Mi tute ne estus foririnta, se mi havus tiam labor-eblaĵojn, porvivojn. Neniel mi povas kompreni, ke hodiaŭ iu sin decidigas por tia paŝo. Sincere mi miras, kiel pacience vi okupiĝas ankaŭ pri tiaj erarintoj.

Edzino de Lajos Grosz, Usono: — Mi volus krii en la mondon: neniu forlasu sian patrujon. Unu el miaj ŝatataj poetoj, Mihály Babits skribis en sia belega poemo „Hazám" (Mia Patrio): „Kian ajn vi travagadas teron, vi kunportas en vi tutan landon: ĝin, obstinan guston, softan kanton, portas kiel la damnit' inferon . . ." Iel mi sentas same.

Edzino de F. Angeli, Italujo: — Mi proponas, ke oni pretigu hejme tian diskoserion, el kiu la eksterlande vivantaj hungaraj infanoj povas lerni.

Pál Rojer, Francujo: — Dum mia lasta Hungarlanda vizito, mia pliaĝa filo interkonatiĝis kun etulino. Ili ankaŭ gefianĉiĝis. Nun ili volus geedziĝi; ĉu tio eblas?

József Lantos, Australio: — Mi povas bone kapti la disaŭdigon sur ondolongo 31-metra. Mi kontentas pri la programo kaj havas nur etan deziron: oni sciigu ankaŭ la meteorologian raporton, ĉar tiam mi povas pli bone imagi, kia estas la vivo hejme.

György Bozsik, Nederlando: — Mi laboris hejme el mia tuta koro kaj animo, sed la maljustaĵoj al mi okazintaj mishumorigis min kaj forprenis mian emon. Ĉi tie, fremdlande mi konsciiĝis, ke tamen tiuj estis pravaj, kiuj, firme starante sur sia loko, restis hejme kaj helpis ĉesigi la erarojn. Nun mi jam iel akomodiĝis, sed neniam mi scios alkutimiĝi.

Ferenc Ábrahám, Aŭstralio: — Ĉiam mi serĉadas en la ĉi-tieaj gazetoj, ĉu eble trovi ion pri mia patrujo? Ĝoje mi konstatas la grandan rolon de Hungarlando en la lukto por la Eŭropa sekureco. Mi ĝojas pri ĝia internacia reputacio. Bonan senton en mi vekas legi en gazeto pri la hungara ekonomia vivo, el plumo de ĵurnalisto vin vizitinta. Li skribas pri ekonomia miraklo.

István Papp, Okcidenta Germanujo: — Ĝis nun mi asertadis, ke mi ne politikas, sed pasint-semajne unu el miaj germanaj kolegoj en la uzino tenis en la mano ĉi-tiean ĵurnalon. Ekbatis mia koro, kiam mi vidis, ke sur la unua paĝo oni okupiĝas pri Hungarlanda evento: granda artikolo pritraktis tie la X-an kongreson de la Hungara Socialisma Laborista Partio, tenatan en Novembro 1970. La artikolo emfazis, ke la kongreso estis plene publika: komunikis ĝin la Radio, la Televido, ĉeestis ĝin la reprezentantoj de la preso, eĉ eksterlandaj. Mi petas sendi al mi tiujn gazetojn, kiuj enhavas la plej interesajn raportojn kaj alparolojn.

Andor Semsey, Argentino: — En la ĉi-tiea ĵurnalo „Prensa" hieraŭ mi legis ekstrakte la raporton de sinjoro ĉefsekretario János Kádár pri la linio-gvido de la interna kaj ekstera politiko. Mia peto estas, ke vi bonvolu al mi sendi la tekston de la koncernata parolo, por ke mi povu ekkoni la gravan deklaron en sia tuto.

*

Jen la leteroj. Komento ŝajnas superflua.

Trad.: **J. Mátéffy**

Sándor Szenes

Hungaraj pioniroj de la tekniko

Antau 40 jaroj forpasis K á l m á n K A N D Ó (1869—1931), kiu dediĉis sian tutan vivon al la evoluigo de la fervoja trafiko. Lia nomo fariĝis famekonata malproksime trans niaj landlimoj.

Jam kiel juna maŝin-inĝeniero li strebis vaste enkonduki la elektran trakcion ĉe la hungaraj fervojoj, anstataŭ la vapora. La unuajn spertojn praktikajn li akiris en la fabriko Five-Lille de Francio; tie li ellaboris la principon de la trifazaj motoroj kaj poste ilian fabrikadon.

En 1894 oni konfidis al li la gvidon de la elektra sekcio en la maŝinfabriko GANZ en Budapeŝto. Dank' al lia eksterordinara talento kaj belaj rezultoj, la fabriko Ganz povis entrepreni en 1898 la elektrizon de ĉ. 100 km. longa fervojlinio en Italio. Tiam K. Kandó kreis la unuan elektran lokomotivon; tie, ĉe la itala elektra fervojo Val Tellina, li pruvis unuafoje la superecon de la elektra trakcio kontraŭ la vapora. Inter la jaroj 1905—1915 li partoprenis la elektrizon de la italaj fervojoj kiel teknika ĉefo de la fabriko Societa Italiana Westinghouse.

En 1917 li fariĝis ĉefdirektoro de la fabriko GANZ kaj komencis ellabori la t. n. fazoŝanĝan elektran lokomotivon. Baze de la konvenaj rezultoj okazis la elektrizo de la unua hungara fervoj-linio, nome la ĉeflinio Budapeŝto—Hegyeshalom (1929—32).

La nomo de *Kálmán Kandó* nedisigeble kunfandiĝis kun la evoluohistorio de la elektra trakcio. Oni aprecis liajn rezultojn per multaj enkaj eksterlandaj distingaĵoj. Tamen, li ne povis ĝisvivi la veran disvolviĝon de sia krea laboro, ĉar en 1931 la morto lin forrabis. Lian nomon surprenis en 1943 la Supera Teknik-Lernejo kaj estimplene gardante flegas lian memoron.

István László

Géza Molnár

ŜANOAR

Anna Lakatos jam en la dua tago vangofrapis la malsanulinon de la apuda lito, surkraĉis la flegistinon, kaj pro tio, malgraŭ ŝia febro de tridek ok gradoj, ŝi estis tuj forigita el la hospitalo.

La incidenton provokis tio, ke la blonda Cicu ŝin atentigis: „Oni ne surgrimpas la liton malpurpiede, kara!". Anna kovris ŝin per la peplomo kaj el sub ŝi replikis: „Mi ne donis al vi slipon de klaĉ-rajto". Cicu mallaŭte diris nur: „Silentu, vi, makulita . . ."

Anna trafis plej precize tien, kie plej doloras.

Jam la saman tagon ŝi hejmenvojaĝis al Hosszúláp. Ferdinando algapis ŝin, kiam ŝi eniris ŝanceliĝante tra la pordo de la kaduka kabano. Enpaŝinte, ŝi tuj eltiris el sub la litkovrilo la ciganinon Vica, prenante ŝin je ŝia hararo. Vica forkuris rapidege.

— Mi estis certa, ke kun tiu ĉi fiulino vi . . . ĝemis Anna kaj plore falis surteren.

— Mi ne donis al vi slipon de klaĉ-rajto . . . — murmuris Ferdinando ebrie. Poste li ŝoviĝis apud la knabinon kaj karesis ŝian nigran hararon per siaj krudaj manoj.

— Ŝanoar . . . Ŝanoar . . . — li flustris kun tenera raŭkeco. — Vi mortos aĉe tie ĉi hejme, Ŝanoar.

Anna Lakatos jam de pluraj jaroj peladis la tristajn ĉevalojn jungitajn antaŭ la vagonetojn en la argilmino de Hosszúláp. Ŝi laboris silente, sed, se ŝi koleriĝis, ŝi piedbatis kaj mordis. Ne tial, tamen, ŝin ne amindumis la viroj, sed tial, ke ŝian kolon kovris violkoloraj makuloj kiel dancantaj flamlangoj.

Ĉi-jare, komence de la humida aŭtuno, la knabino febriĝis kaj sputis sangon. Kelktempe Ferdinando ne tro maltrankvilis. Ĉiuvespere, kiam li hejmenvenis ŝanceliĝante, li manĝigis Annan per multe da ranca lardo kaj cepoj.

Komence de oktobro, nova juna inĝeniero venis al la minejo kaj tuj ekzamenigis la knabinon per kuracisto. Ŝi estis sendita en hospitalon. Nun, forigite el la hospitalo, ŝi ne povis reveni en la minejon, ĉar la inĝeniero jam sciis pri ŝia malsano. Ŝi dungiĝis do en brikfabriko, sed ankaŭ tie ne favoris lin fortuno, ĉar triatage venis rentgen-aŭto por filtra ekzameno de la pulmoj de la laboristoj. Anna estis metita en malsanulan etaton kaj tuj sendita al la pulmosanatorio en Kövestető.

Ferdinando malpeziĝis. Li jam ege timis pro ŝia malsano.

*

En la malsanulĉambro No 6. troviĝis malsanulino nomata Kövesiné, kiu estis jam trifoje operaciita en la lastaj kvin jaroj. Anna rigardadis fikse ŝian diafanan vizaĝon, nuran haŭton sur osto, la litkovrilon sinkintan ĝis la matraco, sub kiu kovrilo nur la anhelanta brusto signis korpkonturojn.

La teruro kaj senesperiĝo elpuŝis Annan en la koridoron. Sed tie la jod-odoro pikis al ŝi la nazon, kaj eĉ pli forte ŝin memorigis pri la teruraĵoj de injekto-nadloj, operaciaj instrumentoj, mortosuferoj. De ĉiu flanko ŝin premis tiu malamika fremda medio.

La flegistino ŝin atentigis: nun estas la horo de silenta ripozo, oni devas kuŝi. Sed Anna ignoris la vortojn, stariĝis ĉe la fenestro, ĉe mallaŭte susuranta radiatoro kaj rigardis la plaŭdantan pluvon.

La sekcia kuracisto, doktoro Láng, haltis malantaŭ ŝi. Anna obstine rigardis la merlon saltantan ekstere sur malsekaj ruĝetaj arbustoj.

— Tamen mi ne kuŝiĝos! . . . — ŝi alkriis lin fine.

Ŝi atendis koleran, malĝentilan respondon, por ke ŝi povu reinsulti kaj furiozi . . . Ke ŝi ree estu elĵetata.

Doktor Láng kontemple karesis sian kalviĝantan verton . . . Lian virineske molan vizaĝon, lian orkadrajn okulvitrojn, liajn grizajn okulojn ekkovris brileto de gaja scivolemo.

— Kara Anneta! Kial estas al vi pli konvene ĉi tie ol interne?

— Tamen mi ne kuŝiĝos! — ripetis la knabino, sed jam malpli spiteme.

La doktoro ridetante etendis al ŝi la manon:

— Nu, bone. Ni promenadu do kune . . .

Anna tute embarasiĝis.

Mi prefere kuŝiĝos — ŝi flustris kaj rapide malaperis tra la pordo.

Doktoro Láng reiris al sia ĉambro kaj elserĉis la morbokarton de la knabino. „Nask. en 1938, Kiŝpeŝto. Profesio: ĉevalpelisto." Nu, jam ĉi tio estas pli ol iom stranga pri virino. Poste li traesploris la diagnozojn kaj demetis la okulvitrojn, frotis siajn lacajn palpebrojn kaj blindete palpebrumis al la opaka lampokloŝo.

— Streptomicino kaj Izonicido, mikse. En ok monatoj kvietiĝos la procezo kaj tiam ni povos forigi la supran lobon.

Li remetis la okulvitrojn, stariĝis kaj komencis senpacience promenadi.

Io timiga sentiĝas en tiuj violkoloraj makuloj. Kvazaŭ du manoj senĉese kunpremus ŝian vizaĝon.

Ĉe la vespermanĝo enkuris al li la flegistino: pro la amo de Dio, li venu! En la sesa ĉambro okazas interbatado . . . La nova malsanulino surĵetis Evan per kuirita ovo, ĉar tiu diris ian rimarkon pri ŝia ĉifona kalsoneto. Ŝi blasfemas kiel ĉevalisto . . .

— Kiel ĉevalpelisto — korektis objektive doktoro Láng kaj ekiris kun la flegistino.

— Imagu, ŝi skoldis ankaŭ min, kiel ordinaran stinkan pu . . . Eĉ minuton mi ne toleros plu ŝin en mia sekcio. Mi ŝin forigos tuj.

— Sed kara fleginjo: ŝi havas tridek ok kaj du dekonojn posttagmeze. Vi puŝus ŝin en la morton.

En la malsanula ĉambro Anna ploris, kliniĝinte sur la liton. Kiam ŝi ekvidis la kuraciston, ŝi subite eksilentis. Ĉi tiu blankvestita viro kun la orkadraj okulvitroj faris al ŝi strangan influon. Ŝi eksentis lian humanecon senkaŝan kaj senmensoge sinceran. Ŝi sentis ian maltrankviligan devon, ke ŝi faru ion alimaniere, ke ŝi ion dokumentu, aŭ por si pledu kontraŭ ia akuzo.

Ŝi saltleviĝis kaj rapide surmetis la surtuton.

— Mi foriras ja, jes, tamen mi foriras . . . — ŝi murmuris kolere.

— Kien? — demandis la kuracisto.

— Hejmen.

— Mi jam rigardis la horaron: al Hosszúláp nur morgaŭ iros trajno. Vi havas tempon abunde kaj nun venu kun mi, por ke mi kompletigu viajn indikojn.

Sekvatage, ĉe la kuracista vizito, ĝuste antaŭ la pordo de la sesa ĉambro, ĉefkuracisto Dragonics haltis kaj turnis sin al Láng:

— Ha, ĝuste nun venis en mian kapon, ke doktoro Kubányi telefonis al mi. Li petis akcepti lian protektatan malsanulon. Ekstervice. Laŭ mia scio, ĉi en la sesa vakantiĝis lito.

— Ne vakantiĝis, kara kolego.

— Iom surprize — ekridetis la ĉefkuracisto delikate, ironie.

— Mi intencas tion al vi klarigi . . . Vespere mi parolis kun Anna Lakatos. Ŝi edukiĝis sengepatre, en hejmo de trovitaj infanoj. Dufoje ŝin ŝia patrino forpelis . . . Ŝi konas nur la lupoleĝojn de la vivo. En ŝia dektria jaro ŝin malvirgigis Ferdinando, filo de etkomercisto. La edukantaj vicgepatroj pelis la knabinon en liajn brakojn, por ke ili parenciĝu kun la riĉa familio de la junulo. Ankoraŭ ne vizitinta lernejon, ŝi jam estis instruata de sia vicpatro, kiel priŝteli poŝojn. Ankoraŭ de neniu ŝi ricevis amon altruisman.

— Mi miras, karulo. Ŝi estas vere kazo nur por esti forigita kaj plu ne tolerata en la hospitalo. Ŝi estas ordinara krimulino! — Dragonics prenis sian cigaredujon kun tremantaj manoj.

— Mi tamen volonte ŝin edukus iom. Ŝia malsano estas grave akuta.

Dragonics eksuĉis fumon el sia cigaredo kaj tio lin retrankviligis.

— Karulo, vi scias bone, ke mi lasas la kolegojn agi laŭ sia plaĉo . . .

Ili malŝatis sin reciproke: Dragonics iam havis altan rangon socian, la titolon de „registara ĉefkonsilisto", posedis sanatorion. Ĉi tiun li perdis. Láng malamis la tutan mondkoncepton, vivmanieron, protektemismon de Dragonics. Kaj ĉi tiu malamis la mondsaveman agitiĝadon de Láng.

— Kaj kio okazos al la aliaj malsanulinoj? — demandis la flegistino. — Kiu toleros la furiozadon de tiu histeriulino?

— Nu, ni donu al doktoro Láng tempon de tolero . . . ĝemis Dragonics kun tia mieno, kiel oni formetas de sia vesto skarabon kaj atente ĝin faligas surteren.

Dimanĉe matene alvenis Ferdinando kaj disbutonumis sian uzitan pluvmantelon. Sub sia jako li havis nur sian bruniĝintan haŭton kaj ĉirkaŭ sia kolo kunligitan, leĝeran, tre buntan muslin-tukon. Anna tuj vidis, ke ĝi devenas de la cigana Vica, sed ŝi nenion diris.

— Mi sopiregis je vi, Ŝanoar . . . Mi ne eltenis plu . . . — murmuris Ferdinando dorlote. — Elvenu kun mi, tra la dratbarilo.

— Ne eble. Oni nin ekvidos.

— Mi scias sub la arboj nestadejon unuarangan. Tie mi tranoktis hodiaŭ kaj aŭskultis la gril-muzikon. La griloj trilas kaj mortadas, ĉar jam estas oktobro.

Tagmeze li postulis de Anna ŝian tagmanĝon kaj bonapetite ĝin formanĝis. Vespere li konsumis ŝian vespermanĝon. Ferdinando manĝis, Anna malsatis.

Lunde vespere la malsanulino Szőllősiné laŭte plendadis, ke malaperis ŝia centforinta bankbileto. Ĉiu sciis, ke nur Anna ŝin povis ŝteli, ĉar ŝi foraĉetis tiutage preskaŭ la tutan bufedon. Anna ploris, furiozis kaj negis.

— La monon mi ricevis de Ferdinando . . . — ŝi diradis ankaŭ al la doktoro, kiu rigardis kun trista konsterniĝo la flamantan taŭzitan vizaĝon.

— Annjo, vi nun survangis min turpe. Ne! Ne pri tio mi parolas. Mi ne volas miksiĝi en viajn amaferojn. Sed . . . Ĉu vi bezonas ĝuste Ferdinandon?

La knabino klinis la kapon. Ŝia hararo falis antaŭen kaj vualis ŝian vizaĝon kiel nigra kaskado.

— Ne koleru, sinjoro doktoro . . . Ankaŭ la hundo amas sian mastron, eĉ se tiu ĝin piedbatas. Kiam Ferdinando min gravedigis, lia patro igis min aborti, kaj metis Ferdinandon en la edukinstituton de knaboj-krimuloj. Sed Ferdinando elŝtelis sin de tie. Li bruligis venĝe la vendejon de la gepatroj: ili fariĝis senhavuloj. Ferdinando vagabondadis, sed ĉiam denove al mi revenis. Foje li alportis boteleton da kolonja akvo, sur kiu estis bildo de nigra kato. Ferdinando diris, ke ĝi estas ŝanoar. Kaj de tiam persiste li min nomadis ŝanoar . . . Mi, kun ĉi mia vizaĝo . . . Ŝanoar . . .

Ŝi levis la kapon kaj dolormiene sed fikse rigardis la kuraciston. Ĉi tiu malfacile eltenis la rigardon, sed devis firme konduti, ne rajtis malkaŝi emocion.

— Bone, Annjo — li trankviligis ŝin ridetante. — Mi petas nur unu aferon: se Ferdinando kondutas al vi afable, ankaŭ vi kondutu al li tiel same. Sed se li mistraktos vin, kun li plu ne kontaktiĝu. Ferdinando tiras vin malsupren, sed vi povus lin suprenlevi. Ĉu komprenite?

Poste doktoro Láng envokis sinjorinon Szőllősi kaj transdonis al ŝi cent forintojn, rimarkigante, ke li ne kredas la kulpecon de Anna, sed prefere li mem kompensas la perdon, por eviti polican enketon, kiu maltrankviligus la malsanulojn.

Sekvatage Ferdinando transprenis la kimonon de la knabino kaj promesis ĝin lavigi en la vilaĝo, sed ĝi iel perdiĝis kaj neniam retroviĝis.

Post unu semajno venis la poŝtisto kaj transdonis al Anna la malsanul-asekuran monon. Ferdinando, kiu antaŭe ĉiam forprenis de ŝi ĉiun monon, nun ne ĉeestis. La knabinon ia infane naiva gajo ekregis. Ŝi petis elirpermeson kaj forveturis per la posttagmeza buso. Ŝi rigardis la deklivojn brilantajn en langvora lumo, la densan fronton de ruĝetaj arboj, la palan griziĝantan ĉielon kaj la lontanajn bluajn promontorojn. Mallaŭte ŝi kantadis sub la vualo de la monotona motorbruo.

En la urbo Miskolc ŝi iris en frizejon kaj sin frizigis. La frizistino persvadis ŝin iri en la kosmetikejon: tie oni malaperigos la makulojn. Ŝi obeis timeme, kaj la mondo ŝvebis ĉirkaŭ ŝi en revo. Kiam la kosmetikisto finis sian laboron, la okuloj de Anna fiksiĝis algluiĝinte al la spegulo. Tiu sama

persono ŝin rerigardis, kaj tamen ne tiu sama, sed ŝia beligita, delikatigita similulino.

En vendejo ŝi aĉetis novan kimonon, poste donacojn al la kunĉambranoj. Al unu ŝi aĉetis pupeton farbitan, al alia broditan tuketon, al sinjorino Szőllősi ledan monujon, por ke de tiam pli bone ŝi povu gardi sian monon, — kaj fine ŝi aĉetis bukedon da neĝblankaj diantoj pakitan en rozkoloran silkpaperon — por la kuracisto.

Jam vesperiĝis, kiam ŝi, ebriete de feliĉa laco, ascendis la buson.

La kunĉambranoj akceptis la donacojn kun delikata afableco. Sincerdire, ili timis ŝin, sed nun ili trankviliĝis, vidante ŝian novan afablan karakteron.

Ili ŝercadis, rakontis humuraĵojn, kaj la vespero forflugis gaje.

Post la vesper-manĝo, Anna volis ŝteliri kun la bukedo al la ĉambro de la kuracisto. Ŝi haltis antaŭ la pordo, sentis, ke eĉ unu solan vorton ŝi ne povus eldiri, ŝi nur demetos la florojn, elkuros el la ĉambro kaj diros al neniu, ke ŝi, por tiom da boneco . . .

Ŝi ankoraŭ neniam ricevis kaj neniam donis florojn. Kruela embaraso ŝin premis. Eĉ frapeti ŝi forgesis, nur premis malsupren la klinkon. La pordo estis ŝlosita. Malrapide ŝi iris direkte al sia ĉambro, kaj, kiam ŝi venis en la koridoron, ŝi ekvidis Ferdinandon. Tiu renkontiĝo tuj detruis en ŝi la gajajn kolorojn de la mondo. Li proksimiĝis kun larĝa ridrikano, sur lia kolo buntis la ŝalo de la cigana Vera.

— Mi venis posttagmeze, Ŝanoar. Tra la pordego. La doktoĉjo permesis al mi atendi vin. Do, mi vin atendis.

Poste li ekkriis gapante:

— Sed vi fariĝis klasika belulino, eta Ŝanoar ! Vere klasa virino ! Kaj vi atendas min kun floroj ! Kiel ministrojn ĉe la stacidomo !

— Lasu la florojn, Ferdinando !

Ĝuste tiam trairis doktoro Láng la halon por iri viziti en alia alo. Subite li alpaŝis kaj metis ŝlosilon en la manon de Anna:

— Eniru nur mian ĉambron. Tie vi povas senĝene interparoli. Mi mem havas multe da laboro.

La knabino mire rigardis la ŝlosilon. Ŝi ne komprenis tion. Ĉu li lasas ilin eniri en lian ĉambron? Kaj solajn? Sed Ferdinando kontente interfrotis la manojn.

— Jen, ni tamen estas gesinjoroj renomaj.

Interne Anna metis la dianto-bukedon sur la tablon, Ferdinando ĵetis sin sur seĝon komforteme. Ili silentis. La viro suspekteme rigardesploris la knabinon.

— Vi ne tre ronronas al mi, Ŝanoar . . .

La knabino ŝultrotiris.

Ferdinando elpinĉis de ie cigaran stumpon kaj ĝin ekbruligis.

— Cetere, al mi tute egale. Donu la enpoŝaĵon kaj mi forvaporiĝos.

— Mi ĝin elspezis.

— He, ne ŝtopu mian kapon per blago, panjeto ! Mi ne venis el idiotejo.

— Ne ekzistas mono, Ferdinando. Mi ĝin elspezis.

Ferdinando ekscitite sulkigis la frunton kaj tamburis per la fingroj sur la tablo.

— Kaj kio nun? Jen mi staras sen unu sola ronda kupro.

Liaj okuloj, kiel ŝtele kurantaj musoj, traesploris la ĉambron, Poste li karesadis per la fingropintoj la jakon de la kuracisto kaj per ĵongla manmovo li eltiris monujon.

— Ĉi tiuj ĉiam estas remburitaj per mono — li murmuris.

— Mi forprenos centeton. Li eĉ ne rimarkos.

— Remetu la monujon, Ferdinando !

— Mi ne donis al vi slipon de klaĉrajto — grumblis la viro kolere kaj per du fingroj li singarde eltiris centforintan bankbileton.

— Remetu, aŭ mi krios alarme !

Anna sin apogis pale al la pordo. Ferdinando ŝin algapis kiel miopulo. Li remetis la monon, poste la monujon en la jako-poŝon. Lante li leviĝis, alproksimiĝis kaj per unu mano kaptis la gorĝon de la knabino, per la alia brako li ĉirkaŭfermis ŝin, ke ŝi ne povis sin eĉ moveti.

— Ĉu florbukedo al la doktoĉjo? Kaj ĉu Ferdinando krevu? Feliĉe, ke via kolo estas violkolora . . . Nu, nun enspiru iom da aero por ne sufokiĝi. Kaj nun vi ree ne spiros, por ke vi povu pripensi . . .

Li nur ludis kun ŝi en sia senpova kolerego, kiel li jam ofte faris antaŭe la saman satanan ludon.

Poste, li subite deprenis la manojn kaj kun freneza timiĝo li elkuris, ĉar el la buŝo de Anna komencis flueti sur lian pugnon varma sango.

*

Doktoro Láng tutnokte sidis apud la lito de Anna. Li mem surmetis al ŝi glaciujon, donis kalcio-injekton, faris la sangotransfuzon. Matene la sangado ĉesis. Anna endormiĝis, kaj la kuracisto reiris en sian ĉambron. Li demetis la okulvitrojn, frotetis la sekajn brulantajn palpebrojn. Li rigardis palpebrumante en la lumon de la lampo-kloŝo, kaj, kvazaŭ resumante malnovan, longan diskuton, li pensis lace: „Bedaŭrinde, niaj travivaĵoj estas de tia speco, ke ni neniam vidas la rezulton. Venas homoj, ni penas, klopodas, fortostreĉas, poste ili malaperas kiel la polveroj dancantaj en la sunlumo."

Li remetis la okulvitrojn antaŭ la okulojn kaj nun li ekvidis la bukedon sur la tablo kaj en ĝi liniitan lernkajeran folieton kun malrektaj, zigzagaj, malbelaj literoj:

„De via plej malbona pacientino."

Kaj tiam kvazaŭ peza ŝarĝo falis de lia animo kaj ĝin plenigis trankvila espero.

Trad.: Sándor Szathmári

Ĉu plaĉas al vi HUNGARA VIVO?

Surprizu viajn amikojn: abonu ankaŭ por ili!

panoramo

En Budapeŝto, en la komenco de la jaro malfermis sian pordon unu el la plej grandaj kaj modernaj cirkoj de Eŭropo. La solena programo de „Ĉefurba Granda Cirko" vizitata de plenŝtopita rigardejo, kaj daŭranta tri monatojn estis granda evento de la tuta internacia cirkomondo. La plej konataj eksterlandaj cirkodirektoroj, fakuloj kaj impresarioj alvenis por pruvi per la ĉeesto sian interesiĝon kaj rekonon.

En koncerto, aranĝita en la rezidejo de la Unuiĝintaj Nacioj okaze de la *tago de la Homaj Rajtoj*, la kvarteto Bartók prezentis sian programon kun granda sukceso. Ili komencis la koncerton per la kvara arĉkvarteto de Béla Bartók. Pri la 25a datreveno de la morto de Bartók memoris ankaŭ *Edward Hambro*, la prezidanto de la plenkunsido, en sia festparolado. Post la koncerto la ĉefsekretario *U Thant* aranĝis akceptadon honore al la artistoj kaj varme gratulis la membrojn de la hungara kvarteto.

*

Dum la daŭro de la kvara kvinjarplano oni intencas elinstrui jare 100 programistojn—matematikistojn en la universitato Attila József en Szeged. En tiu universitato oni instruas jam de 1956 la komputerteknikon al la studentoj de la katedro matematiko—fiziko.

*

Je la rekomendo de Filipo, duko de Edinburgh, la plenkunsido de la Internacia Rajdista Federacio (FEI) transdonis al Hungarlando la rajton aranĝi la unuan Eŭropo-ĉampionadon de jungaĵkonkurso. *La ĉampionado disvolviĝos ĉi-jare en Budapeŝto, okaze de la Ĉasista Mondekspozicio. Kvankam oni planis Anglion la scenejo de la unua Eŭropo-ĉampionado de jungaĵkonkurso, konsiderante niajn ĉistarajn rezultojn en tiu sportobranĉo, oni transdonis al ni la unuaecon. La rezolucio vekis seriozan interesiĝon en la plenkunsido, rezulte de kio GFR, Pollando, Jugoslavio, Svislando, Britio, Nederlando kaj ankaŭ unu el la Amerikaj federaciaj ŝtatoj anoncis sian partoprenon en la aŭtuna unua granda renkonto.*

*

La ĉi-jara numero de la revuo *Dokumentum*, organo de la artmemoraĵprotekta organizo de UNESCO, kun abunda nombro da ilustraĵoj, detale konigas la restaŭron de la fortikaĵo de Buda, en la studo de la restaŭristo, d-ro László Gerő.

*

Oni aljuĝis la premion Herder de la jaro 1971. al akademiano muzikscienculo *Bence Szabolcsi*. La premion donacas ĉiujare la Viena universitato, kun la celo akceli la plifortigadon de la kulturaj interrilatoj kun la popoloj de Orient- kaj Sud-Eŭropo.

*

La plenumkomitato de ICOMOS, la internacia konsilio de la artmemoraĵprotektado, dum sia Pariza kunsido decidis aranĝi la 3an kongreson de la konsilio en 1972 en Budapeŝto. Tiu mondorganizo, kiu apartenas al UNESCO, faris tiun rezolucion pro tio, ĉar ĝi rekonas kaj aprecas la artmemoraĵprotektan laboradon plenumitan en Hungarlando, kaj per la kongreso ĝi grave kontribuos al la festaranĝoj de la centjara datreveno de la hungara artmemoraĵ-protekta organizo.

*

La entrepreno TECHNOIMPEX partoprenos ĉijare 40 internaciajn aŭ memstarajn ekspoziciojn, prezentante la plej novajn produktojn de la hungaraj maŝinfabrikadaj entreprenoj. TECHNOIMPEX aranĝos memstarajn ekspoziciojn en 4 grandaj urboj de GFR kaj en la italaj urboj Bari kaj Milano. Inter la transmaraj produktelmontroj la plej granda estos tiu en Toronto, sed estos aranĝitaj elmontroj de hungaraj il-maŝinoj ankaŭ en Aŭstralio kaj Argentino.

*

Antaŭ nelonge mortis 85 jara *Menyhért Milton Smith-Kupferschmidt*, tajloro en Novjorko, nia iama samlandano elmigrinta en Usonon. Testamente li donacis al sia iama patrujo, al la Literatura Muzeo Petőfi, valoran Petőfi-dokumenton: editoran kontrakton el 1846.

*

En la operejo de la pola urbo Poznan oni prezentis du verkojn de Béla Bartók, la Mirindan Mandarenon kaj la Reĝidon Skulptitan el Ligno. Okaze de la debuta prezentado oni malfermis en Poznan memorekspozicion pri Bartók.

*

Granda sukceso estis la Bartók-festivalo en Beogrado. La plej famaj jugoslavaj muzikartistaj kaj sciencaj personecoj prelegis pri Bartók. Okaze de la festivalo konataj muzikistoj interpretis komponaĵojn de Bartók.

Glosoj: restaŭri = konstrue restarigi
editoro = eldonisto
komputero = elektrona kalkulmaŝino uzata por cibernetikaj celoj

panorama

La duonon de produktoj de la *fajencfabriko en Hódmezővásárhely* konsistigas pecoj ornamitaj per desegnoelementoj ĉerpitaj el la hungara popolarto, la alia duono estas t.n. modernaj ceramikaĵoj. La fabriko aplikas la karakterizajn popolajn ornamelementojn de sia ĉirkaŭaĵo. Oni uzis ĝis nun ĉ. 380 specojn de tiaj ornamelementoj kaj la fabriko eksportas siajn produktojn nuntempe en 16 landojn, precipe en Nederlandon, FDR, Danlandon, Usonon kaj Svedion. La eksporton organizas ARTEX Eksterland-Komerca Entrepreno.

Antaŭ nelonge oni aranĝis internacian ekspozicion de trafikmapoj en Budapeŝto. Konekse kun la ekspozicio, d-ro Andor Radó, Kossuth-premia universitata profesoro, la gvidanto de la Kartografia Oficejo, diris: „Hungarlando estas avangarda lando en la kartografio. El ĉiu parto de la tero venadas al ni sciigoj pri ŝanĝoj en la vojcirkonstancoj, kaj ni pludonas tiujn sciigojn al ĉiu kartografo de la mondo." La ekspozicion partoprenis 72 institucioj el 33 landoj kun sume 300 geografiaj kartoj. Post la ekspozicio la partoprenintaj landoj ne repetis la eksterordinare valoran materialon, sed donacis ĝin al la Budapeŝta Trafikmuzeo. En la periodo de la ekspozicio estis okazigita la internacia kartografia simpozio, al kiu venis 44 eksterlandaj fakuloj. Dum la scienca kunsido ili pridiskutis la atingitajn rezultojn kaj renkontitajn problemojn sur la kampo de la verkado de trafikmapoj.

*

Rekordan nombron atingis pasintjare la hungara-pola fremdultrafiko. 400-mil poloj vizitis Hungarlandon en 1970. kaj ĉiujn ĝisnunajn superis la nombro de la hungaroj vojaĝintaj al Pollando.

Vizitante Hungarion uzu la servojn de

IBUSZ

la plej malnova vojaĝagentejo de la lando.

Hotelĉambro-rezervado
Aranĝo de pasport-kaj enirvizo-afero
Aĉeto kaj vendo de eksterlandaj valutoj
Biletoj por aeroplano, ŝipo kaj trajno

Ekskursoj kaj programoj
Urbospektadoj
Servo de fremdulgvidantoj kaj interpretistoj
Senpaga konsildona servo en vojaĝaferoj

Oficiala vojaĝagentejo de la Mondekspozicio de Ĉasado

IBUSZ-AGENTEJOJ EN ĈIUJ URBOJ DE LA LANDO

REPREZENTEJOJ:
ĉe limstacioj en hoteloj kaj ripozlokoj

VI ŜPARAS MONON KAJ TEMPON UZANTE NIAJN SERVOJN

IBUSZ agentejoj eksterlande

Amsterdamo	Londono	Romo
Berlino	Moskvo	Sao Paulo
Bruselo	Otavo	Stokholmo
Frankfurto	Parizo	Vieno
Kolonjo	Prago	

MIHÁLY LADÁNYI

NUR RIMO KAJ RITMO

Ielan kanton
konvenan por preĝlibro
mi serĉas en la poŝoj
de la vespero,
tristete fornaĝantan en la vento
kiel violona rulado,
kiu al neniu ofendas
la rosan animon,
nek al dio, nek al ateisto,
donu tian poemon, sinjoro,
tian kanton flirtan,
de kiu ne altiĝos
la sanga tensio de oficisto,
nenio en ĝi troviĝu
krom rimo kaj ritmo,
ĝi ne estu maltrankvila,
ĉar jam temp' està,
ke mi kaŭru kune
sur vazo kun surskribo ,,Bonvolu do''
kun iu ajn beate.

KAJ FINFINE

Kaj finfine, nenia kaŭzo malesperi: mi vin amas
kaj pri vi revas. Eĉ tiam, se
pri ĉiu mia revado pretiĝas ekzakta statistiko:
kiam mi entuziasmis pri vi unue, kaj kiam mi pro vi malesperis.
Ĉar, vidu, de kiam iu nia praulo inventis la Historion,
ni ne povas vivi
sen dokumentado, transdonite al la forgeso.
Vidu, sur la kolo del heroo la tabulon HEROO — kaj ankaŭ sur la kolo del ekzekutisto troviĝas tabulo.
Kelkfoje iom
malfruas la limtempoj. Al la Historio, nome, estas egale.
Ĝi faras sian laboron kiel purigisto antaŭ pensio. Ĝi certas pril faro.
La Historio tordas la lipharojn pintaj, tiras surokulen la ŝirmledan ĉapon kaj kunbalaas la ostojn.
La ostojn del poetoj kun tiuj del agentoj. Kaj kiam la amaso jam stas konvena, ĝi diras:
Nu, fine mi povos ripozi !
Sidiĝas. Kraĉas.
Estas paco.

ELEGIO

Kunfrapiĝas post mi la ondoj del jar,
el mia hurla buŝ la vortoj plu ne sparkas.
Kiel mi scius, kia estos la postepok !
Kelkfoje mi abomenas la dekjare pli junajn:
povas esti, ili fine ridegos pri mia amareco,
el mia kanto la salo solviĝos en ia fluidaĉ
kaj neniun plu mordos.
Forpasos mia tempo.
Ĉiam pli ofte mi estas sola.
Mia voj malfacilis, defore mi trotetis surpiede,
de kampoj surkraĉitaj, montetflankoj aridaj,
kie floris nur revoj kaj eŭforbioj,
domaĝe pri ĝi memori. Forpasos mia tempo,
kaj kiel glav-akrigisto del Husanaj militoj
mi maljuniĝos inter tranĉiloj kuirejaj
fajfante febrajn oldajn kantojn.

Tradukis: *K. Kalocsay*

MIHÁLY LADÁNYI, poeto, nask. en 1934, dotita per premio Attila József. Li apartenas al la poeta generacio, kiu anoncis sin post la jaro 1956. De tiam ĉiuj niaj beletraj revuoj publikigas liajn poemojn, kiujn li aperigis jam en ses verslibroj. Li estas engaĝita poeto: la figurojn, okazaĵojn, aperaĵojn nedezirindajn, kiujn li renkontas dum la konstruado de la socialismo, li surpingligas kun amara-petola moko, kun ia nostalgio je revolucia romantiko.

Kolekton de reproduktaĵoj en ĉiun departementon!

Antaŭ 12 jaroj oni faris en Budapeŝto ekspozicion el bonkvalitaj reproduktaĵoj de pentraĵoj: la kolekton, kiu estis kunmetita el 300 pecoj, elektis eminentaj pentrinstruistoj, komisiitaj de la ministerio por klerigo. Ĝi prezentis skize la universalan historion de la pentroarto ekde la grotpentrado ĝis la nuntempo, do ekde la pratempoj ĝis hodiaŭ. *Ĝia celo estis montri la vojon de la pentrarto, alie ne trarigardeblan por laikuloj, kaj ĝi estis taŭga ankaŭ evoluiigi la priartan inklinon, helpi la priestetikan edukon kaj pliintensigi la kulturon de vido, demonstri la interligojn de la sociohistorio kaj la pentrado. La ekspozicio vekis viglan eĥon: okazis la malofta kazo, ke kaj la kritiko kaj la publiko unuanime entuziasmis pri la kolekto.*

Post tiu sukceso, oni sendis tiun kolekton al migrovojo. Dum 12 jaroj ĝi vizitis la pli grandajn urbojn de la lando. *Antaŭ nelonge la kunmetintoj de la kolekto invitis la fakulojn de klerigado, instruistojn, popolkerigistojn, kiel oni povus krei tian kolekton de reproduktaĵoj por ĉiu departemento. Poste la departementaj ĉefurboj havos la taskon sendi la kolekton plue al la distriktaj ĉeflokoj kaj ankaŭ al vilaĝoj, ke kiel eble plej multaj povu ekkoni — eĉ se nur el reproduktaĵoj — la kulturan heredaĵon de la homaro. Ankaŭ la lernantoj ricevos per la kolekto rektan helpon, ĉar la kunmetintoj de la ekspozicio priatentis ankaŭ la materialon de la instruo-plano. Nenio malhelpas la realigon de la interesa kaj bela projekto. Pluraj el la invititoj proponis kompletigi la kolekton ankaŭ per bildoj pri skulptaĵoj kaj arkitekturaĵoj.*

Tr. T. Ujlaky Nagy

Plasto-kemio en la ledo-produktado

Kiel produkti senriproĉan pretan ledvaron el malpli valora, kolore malperfekta bovo-ledo, jen estas grava teknika-scienca tasko, kiu jam de *multaj jaroj atendis sian solvon ĉe ni kaj eksterlande. Tiun solvon donis antaŭ nelonge hungara inventaĵo registrita, ĝuanta patentan ŝirmon en dek kvar okcidentaj landoj. La inventintoj estas ĉeftek-*

nologo Vilmos Bär kaj kemia inĝeniero Zoltán Vér; ili ellaboris teknologion, kiel koherigi al la kruda ledo dispersitan plasto-materialon rezistan al kemiaĵoj. La plastomaterialo forte koheras kun la ledo kaj ĝia saturefiko estas tute homogena, tiel ke la metodo rezultigas glatan ledo-surfacon.

Plena eldono de la Bartók-verkaro

La jaro 1970 estis riĉa je internaciaj sukcesoj por la Hungara Sondiskoprodukta Entrepreno. Komence de la pasinta jaro kvar Liszt-diskoj *elmeritis la grandan premion* „Academie de disque francais". *La surdiskigo de la opero* „Vérnász" de Sándor Szokolay *ricevis honorigon. Aŭtune la* Kvardiska albumo de la hungara popolmuziko *gajnis okcidentgermanan grandan premion. Fine, en decembro la plej grandvolumena entrepreto de nia sondiskoproduktado, la kompleta eldono de la* verkoj de Bartók, planita sur 39 diskoj *kun la fabrika marko* Hungaroton, *gajnis elstaran rekonon: la ĝis tiam aperintaj 15 diskoj de la kolekto elmeritis la pasintjaran* „Grand prix national de disque" *t.e. la francan nacian grandan premion de sondisko.*

La diplomon pri „Grand prix" transdonis en Parizo la ĉefurbestro de la urbo al la filo de la majstro, Béla Bartók, membro de la redakta komitato de la plena eldono.

La surdiskigaj laboroj de la plena eldono de la Bartók-verkaro finiĝos en tiu ĉi jaro kaj la aperigon de la plena kolekto oni planas por 1972.

Trad.: L. K

Kuriozaĵo

Psikologo de la Universitato Ayana en Detroit (Usono) kompilis statistikon pri blasfemado surbaze de ekzamenado inter plurmiloj da homoj. Laŭ tiu el la laboruloj de la diversaj laborterenoj plej malmulte sakradas la sekretarioj kaj tajpistinoj; ĉe ili nur ĉiu ducenta vorto estas blasfemo. Sed ĉe la universitataj studentoj ĉiu dekkvara, ĉe laboristoj de konstruindustrio — ĉiu kvara vorto estas blasfema.

Intervjuo kun la nova prezidanto hungara de la internacia Fervoj-Unio (Uic)

Inĝ. *Karlo RÖDÖNYI*, nia unua vicministro de trafiko kaj poŝtaferoj, estis elektita por 1971—1972 prezidanto de UIC (Union Internationale des Chemins de Fer). Nia revuo ĉi-okaze petis intervjuon de la nova prezidanto, pri kiu estas sciate, ke li estas tre favora al Esperanto kaj tion plurfoje montris per gravaj agoj de subteno. Ni demandis lin unue: — *Kio estas kaj kiel funkcias tiu grava organizaĵo UIC?*

— La fervojoj Eŭropaj — li respondis —, fondis union en 1922; aliĝis ankaŭ fervojoj Aziaj. Nun jam 44 fervojoj, 432 000 km-oj da relvoja reto kaj pli ol kvin milionoj da laboristoj apartenas al la Unio, el ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio. La Unio reprezentas la membrojn-fervojojn ĉe aliaj interŝtataj organizaĵoj, sed ĝia ĉefa celo estas konstante plibonigi la kondiĉojn de la fervoj-funkciado; helpi, ke la instalaĵoj kaj la funkciado de la fervojoj estu pli unuecaj kaj modernaj. La ĝenerala sekretario kaj la administracio de la Unio rezidas en Parizo. La ĝenerala kunsido kunvenas kutime unu fojon ĉiujare.

— *Kian utilon havas la agado de UIC por la membroj-fervojoj?*

La strikta kunagado de la membroj-fervojoj en UIC estas favora precipe al la malpli grandaj, kiuj ne kapablus fari solaj la diversajn studojn kaj eksperimentojn por sia modernigo. Tiujn la diversaj UIC-komisionoj faras bonrezulte; tiamaniere faciligas la enkonduko de la plej modernaj iloj kaj labormetodoj kaj ilia unueca aplikado.

— *Kiajn taskojn de ĝenerala intereso volas solvi UIC en la proksimaj jaroj?*

— La diversaj komisionoj, laborgrupoj ktp. okupiĝas pri la problemoj laŭ peto de iu fervoja ĉefdirektoro; por solvi tiajn taskojn, la plej bonaj ekspertoj de unu aŭ pluraj fervojoj faras studojn kaj esplorojn. La union en sia laboro gvidas ĉiam la koncepto de la plej bone kunakordita trafiko. — Sur tagordo nun estas ekz. la efektivigo de la unueca rapidtrafika reto de Eŭropo, la plirapidigo de la var-frajtado, la disvastigo de la frajtado disde domo al domo. La teknologio konstante evoluas, la energioportaj materialoj ŝanĝiĝas, novaj procedoj de frajtado estas enkondukataj — ĉio ĉi necesigas kontinuan okupiĝadon kaj serĉadon de konformaj, elastaj solvoj akomodiĝantaj al ĉiu situacio. Mi mencias ekzemple la aŭtomatan kuplil-establaĵon efektivigotan ĉe la Eŭropaj fervojoj; teknike ĝi jam estas realigita rezulte de strikta kunlaboro en la Organizaĵo de Socialismaj Fervojoj. Espereble, ankaŭ la ceteraj problemoj aktualaj baldaŭ estos solvitaj.

— *Kiel ni povas pritaksi tion, ke en via persono oni elektis hungaran fakulon prezidanto de UIC?*

— La Hungaraj Ŝtatfervojoj ne povas prezenti spektaklajn rezultojn kiel la grandaj fervojoj de Eŭropo. Sed ni ĉiam klopodis laŭeble partopreni en la internacia laboro kaj kontribui al la progreso. Ties rekono montriĝas en tio, ke post la franca, germana, brita, svisa, pola, sveda, belga prezidanto mi estis elektita transpreni la prezidantecon de UIC. Baze de la fido metita sur min, mi klopodos, ke helpe de la tuta aparato de UIC ni trovu la ĝustan vojon por la solvo de la atendantaj taskoj. Tiel ni povos festi en konvena maniero la 50-an jaron de la ekzisto de ĉi tiu unio.

Dankante s-ron vicministron por liaj klarigoj, ni adiaŭas lin, dezirante sukceson al lia vere grava laborado.

Dro István Bácskai

Pál Morvai:

BNV '71
BIF-'71
Budapeŝta Internacia Foiro



Kiel jam de jaroj, la Budapeŝta Internacia Foiro — okazinta inter la 21—31. de majo 1971 — estis reprezenta varekspozicio de hungara kaj eksterlanda industrioj.

Post la liberiĝo la jubilea centa Foiro de Budapeŝto estis aranĝita en 1948, sed la pli granddimensia disvolviĝo de ĝia internacia karaktero komenciĝis nur en 1958. La nomo „Internacia Foiro" signifas kompreneble eksterlandan partoprenon. Ankaŭ ĉi-jare alvenis ekspoziciantoj el pli ol 30 landoj, — inter ili nun la unuan fojon partoprenis per oficiala ekspozicio Danio kaj Irlando.

27 landoj reprezentis sin en la ekspozicioj en oficiala formo. Krom la socialismaj landoj prezentis siajn varojn ankaŭ aliaj 11 landoj el Eŭropo, krome Brazilo, Hindio, Japanio, Kanado, Pakistano, Sirio, Unuiĝinta Araba Respubliko kaj Usono.

Post plurjara interrompo el la menciitaj landoj oficiale partoprenis Belgio, Hindio kaj Unuiĝinta Araba Respubliko. Grekio prezentis siajn produktaĵojn en memstara pavilono, dum Svisio, Svedio, Luksemburgo kaj Liĥtenŝteino estis reprezentitaj per individuaj ekspoziciantoj. La eksterlandaj eksponantoj aranĝis siajn varprezentojn parte en kolektivaj naciaj pavilonoj, parte laŭ specialaj produktogrupoj en komunaj pavilonoj. Francio kaj Rumanio aranĝis siajn eksportproduktaĵojn sur multe pli granda areo ol en 1970.

Oni povas noti sukceso de Budapeŝta Internacia Foiro, ke en la ĉi-jara foiro partoprenis UNIDO, t.e. la industrievoluiga organizo de UNO.

Inter la produktaĵaj grupoj, prezentitaj en la 1971-jara BIF (BNV), ne troviĝis presindustriaj maŝinoj, ĉar tiuj estos prezentataj en INTERPRESS '71, t.e. instrument-ekspozicio de internaciaj amas-komunikadaj iloj, aranĝota en la foirurbo inter 10—17-a de oktobro. En la nun pasinta foiro proponis siajn produktaĵojn rimarkinde multaj entreprenoj fabrikantaj kaj vendantaj ilmaŝinojn kaj instalaĵojn de malpeza industrio.

Nunjare 40%-j de la prezentitaj varoj estis hungara produktaĵo. Tiuj varoj estis aranĝitaj laŭ fakoj, grupigitaj krome laŭ fabrikaĵaĵ specoj.

HUNGEXPO, kiel foiraranĝanto, deziris doni pli grandan gravecon al la komerca aktiveco. Ankaŭ ĉi-jare ĝi funkciigis la Renkontejon de Eksterlandanoj por helpi la eksterlandajn kontaktiĝojn.

Laŭ novaj vidpunktoj oni aranĝis la kvin Fakajn Tagojn. La nova dispozicio ebligis, ke la koncernaj fakuloj koncentru sian foirejan viziton je la konvena tago kaj tiel multe epliprofundigu siajn interrilatojn.

BIF en sia nuna formo, kun la naciaj pavilonoj, jam ne konformas al tiuj pretendoj, kiujn postulas la nivelo de nia evoluinteco. La naciaj pavilonoj havis ekzistorajton tiel longe, dum temis pri ĝenerala „sinprezento" de diversaj landoj, sed la tasko de BIF nun jam ne estas sole doni ĝeneralan konigon. Se ĝi volas respondi al la supre citita tasko, — tiam — eĉ inter la nunaj cirkonstancoj — oni devas komenci la specializon de la Foiro.

Atente pri tiu neceseco naskiĝis la decido, ke ekde 1972 ĉiujare okazos du BIF: printempe kaj aŭtune, kun internacia partopreno. En la printempa Foiro oni prezentos instalaĵojn por la industrio, kaj aŭtune komunbezonajn artiklojn.

En la ĉi-jara Budapeŝta Internacia Foiro la komerca, negoca aktivado estis ankoraŭ pli intensa ol antaŭe kaj en la enlanda kaj en internacia merkatoj.

MEDICOR

produktas kaj eksportas:

instalaĵojn por rentgena diagnozo kaj radio-terapio, medicinajn elektrajn kaj elektronajn aparatojn por diagnozado kaj por kuracado, dormigajn aparatojn, instalaĵojn por operaciejoj kaj por malsanul-ĉambroj, sanitarajn veturilojn, medicinajn kaj veterinarajn instrumentojn, sanitarajn amasartiklojn, unufoje uzeblajn sterilajn ilojn. Kompletaj sanitaraj unuoj estas projektataj kaj liverataj. Informado kaj konsilado en hospital-projektaj-organizaj aferoj.

Medicor Uzinoj Budapeŝt

MEDICOR

MEDICOR BUDAPEST

Károly Reich

Ĉi tiu artisto estas mirind-voĉa lirikisto de l'hodiaŭa hungara grafikarto. Li mem ja konfesas sin nur metiisto, libroilustristo — ĉar li estas tre modesta —, sed laŭ talento li estas unu el la plej eminentaj hungaraj grafikistoj. Laŭmerite li ricevis en jaro 1963 la plej altan ŝtatordenon, la Kossuth-premion.

Li fariĝis same granda kiel ilustristo de fabellibroj kaj de famaj romanoj, kiel kreanto de murpentraĵoj de infanurboj, infan-ĝardenoj, infanhospitaloj kaj de memstaraj desegnaĵoj.

En liaj kreaĵoj rolas plej ofte ĉevaloj, bovoj, belegaj nudaj knabinoj, knaboj, kaj ĉirkaŭe la naturo: rivero, lago, kampo, montoj, arbaroj, arboj, floroj, ŝtonoj, birdoj. Ne multaj estas liaj favorataj modeloj kaj herooj, tamen ili spegulas la tutan mondon, la antikvan belecidealon kaj la pacan vivon indan je homo. Ankaŭ la veraĵoj kaj ideoj de lia arto estas same simplaj: humaneco, paco, beleco, boneco. Kiaj fontoj nutras ĉi tiun simpatian arton? — La neelĉerpebla memormondo de la infanaĝo: lia naskiĝvilaĝo sur la bordo de Balatono, la korto de kamparana avo, fiera pri siaj belaj ĉevaloj, la longaj galopoj, ĉevalbaniĝoj kaj ĉirkaŭe la mediteraneeska, ĉarma pejzaĝo.

Ĉiuj ekspozicioj de Károly Reich kaj la apero de libroj ilustritaj de li estas eventoj por hungaraj artist-amikoj, kaj li estas estimata, kara, ofte invitata gastartisto de eksterlandaj ekspozicioj. Ni kredas, ke ankaŭ niaj legantoj ekamos lin pro liaj ĉi tie prezentataj desegnaĵoj. **- gm -**

KÁROLY JOBBÁGY

MALJUNIĜ' NE EBLAS...

Ĉi tie maljuniĝ' ne eblas,
en ĉi torento de juneco,
en kiun tage mi trempiĝas
kaj reviviĝas ĉiutage.
Superba ĉevalar' impeta!
Ĝissonas paŝ-tondrad', dum ili
malsupren sur ŝtupar' galopas
fajfante la „beat"-kantojn novajn
sur koridor-pavimo olda.
Kaj de l'lernej' fortumultante
ili kunportas predon ĵusan,
denove el mi unu pecon,
el mia fort' kaj emocio.
Kaj sub la brilaj sunradioj,
en svarmo de plenplenaj stratoj,
disvolvas, levas superkapen
al alt', ke ilin vidu ĉiuj:
miajn parolojn,
kiel flagon.

(Gimnazio Eötvös en Budapeŝto)

GAPANTE EN FAJRON

Arbaro flagre ruĝas;
sur arbotrunkoj kuŝas
serpento sibleganta
aŭ arane' giganta.

Freŝverda filikaro,
ter' virga de ĝangalo,
inter lianoj glitaj
frondaroj vent-vipitaj.

En la brulantaj karboj
milionjaraj arboj

susuras, kaj, en kaŝo,
jen ombroj sub ardaĵo:

Cervaro en timego
kaj granda bizon-grego:
huftondre ili kuras,
kiam fajrer' susuras.

Mi sidas en pramondo,
sub suna fajra ondo.
Sin paŝtas ĉe la brakoj
plumpegaj pigraj drakoj.

Trad.: **Péter Rados**

K. JOBBÁGY, nask. en 1921, estas elstara lirikisto nuntempa, dufoje dotita per la premio „Attila József". Li estas esperantisto, membro de la redakta komitato de H. V. La prezentitajn du poemojn entenas lia ĵus aperinta, sesa poemvolumo „Papírszárnyak" (Paperflugiloj).



PLILONGIGU VIAN EKSTERLANDAN RESTADON... MALLONGIGU LA VOJAĜTEMPON...

FLUGU PER MALÉV!

Rektaj fluglinioj inter BUDAPEŜTO kaj la ĉi-subaj urboj:

ALĜERO
AMSTERDAMO
ATENO
BEJRUTO
BEOGRADO
BERLINO
VIENO
BRUSELO
BUKAREŜTO
DAMASKO
DREZDENO
DUBROVNIKO
ERFURTO
FRANKFURTO
HELSINKO
ISTANBULO
KAIRO
KIEVO
KONSTANCO
KOPENHAGO
LENINGRADO
LONDONO
MADRIDO
MILANO
MOSKVO
MUNKENO
NIKOZIO
OSLO
PARIZO
PRAGO
ROMO
STOKHOLMO
SOFIO
TIRANO
TUNISO
VARSOVIO
ZURIĤO

MALÉV biletvendejoj:

Budapest V., Váci utca 1.

kaj

Dorottya utca 2.

TELEFONO: 186—805

MALÉV

Magyar Légiközlekedési Vállalat

(HUNGARA AERTRAFIKA ENTREPRENO)

ENHAVTABELO

de Hungara Vivo 1961–1970

Multaj legantoj jam de kelkaj jaroj esprimis sian deziron, ke ni kunmetu enhavliston pri la dek jarkolektoj de nia revuo. Ĝoje ni anoncas, ke la enhavlisto pretiĝis. Eĉ la redaktoroj mem mire konstatis, kiel riĉa trezorejo de la hungara kaj Esperanta kulturo kolektiĝis dum dek jaroj el la fervora, kapabla kaj talenta laborado de niaj verkistoj, poetoj kaj tradukistoj. Koregan dankon al ili, kaj same koregan dankon al niaj karaj abonantoj kaj legantoj! — Kelkloke ni ŝanĝis la titolon de la artikolo, por ke la leganto jam el la teksto de la titolo informiĝu pri la enhavo. Multfoje ni ankaŭ mallongigis la tekston de la titolo pro deviga ŝparado. La nomoj en parentezo estas tiuj de la tradukintoj, la familia nomo de la aŭtoroj staras antaŭe.

TRADUKITA PROZO

Abody Béla: Vivo-savo. 70/1. *(Tárkony)*
Ady Endre: La Fuliko kaj Feri. 63/2. *(Tárkony)*
Asturias: La supo. 69/3. *(Kalocsay)*
Bán Béla: La fianĉo-anst. 65/2. *(Balkányi)*
Barabás Tibor: . . . de Sarastro. 66/4. *(Balkányi)*
Bárány Tamás: Enhaveniĝo. 66/4. *(Tárkony)*
Csurka István: La maljuna statisto. 65/2. *(Khek M.)*
Csurka István: LSD. 70/3. *(Tárkony)*
Darvas Szilárd: Boneco. 63/1. *(Mezei)*
Eötvös Károly: Kio estas la rido? 62/3. *(Szalay)*
Fejes Endre: La mensogulo. 64/1. *(Tárkony)*
Fekete István: Julio. 68/4. *(Kun Lenke)*
Feleki László: Famaj homoj. 70/1. *(Tárkony)*
Feleki László: Tri humuraĵoj. 65/3. *(Tárkony)*
Feleki László: Futbal-matĉo. 67/2. *(Tárkony)*
Felkai Ferenc: Trompiĝinta migrulo. 66/3. *(Gyulai K.)*
Fodor József: Utilo kaj plezuro de la verslegado. — 65/4. *(Tárkony)*
Füst Milán: Reĝo Melas . . . 67/4. *(Kalocsay)*
Gárdonyi: Trakto pri kulp-afero. 64/1. *(Ujlaky)*
Gárdonyi: Por niaj karaj infanoj. 68/3. *(Csiszár Ada)*
Gergely Mihály: Profunde en la arbaro 66/3. Soleca telefonulo 69/4. — Petego por homa vorto 70/4.
Gyárfás Miklós: Nur kuraĝe, Metuŝelah! 63/1. *(Bodó)*
György István: Anna kaj Anna. 63/4. *(Ujlaky)*
Györki József: Vivo de juna agrikulturisto. 62/2. *(Somlai)*
Gyurkó László: Lenin, oktobro. 70/1. *(A. K.)*
Hanĉar Olesj: Danuba etudo. 70/1. *(N. Andrianova)*
Heltai Jenő: Disĉiploj. 61/3—4. *(Somlai)*
Heltai Jenő: La morto kaj la kuracisto. 62/3. *(Somlai)*
Heltai Jenő: Anĝelo. 65/4. *(Somlai)*
Heltai Jenő: La hundo de la morto. 68/2. *(Kun)*
Hunyady Sándor: Pantalono kaj la amo. 67/1. *(Ujlaky)*
Illés Béla: La diplomo de Julia. 63/3. *(Balkányi)*
Illyés Gyula: La popolo de la stepkortoj. 66/3. *(Tárkony)*
Jobbágy Károly: Altranga invito. 66/3. *(Tárkony)*
Jobbágy Károly: Cégénydányád. 70/3. *(Tárkony)*
József Attila: La maljuna ŝuisto. 68/2. *(Vári Márta)*
Juhász Gyula: „Espero". 63/4. *(Farkas Ernő)*
Kafanova: La renkontiĝo. 68/4. *(Polišĉuk)*
Kamjén István: Unu minuto. 66/4. *(Szalay)*
Karinthy Frigyes: Senespera amo. 63/2. *(Bodó)*
Karinthy Frigyes: La cirko. 68/2. *(Szathmári)*
Kárpáti Aurél: De Stratford al Stratford. 62/4. *(Bodó)*
Katkó István: Ĉiam aliloken. 70/4. *(Kalocsay)*
Kékesdi Gyula: La pastro de la vilaĝo. 61/2.
Kékesdi Gyula: Filo de sia patro. 65/3. *(Szerémi)*
Királyhegyi Pál: La mondfamo kaj mi. 66/4. *(Kökény)*
K.-Grandierre Emil: Geedziĝo . . . 65/3. *(Kalocsay)*
Kortsák Jenő: La unua. 65/4. *(Tárkony)*
Kosztolányi Dezső: Trovita mono. 66/1. *(Tárkony)*
Krúdy Gyula: Glaso da brando. 62/1, 62/2. *(Tárkony)*
László Anna: Malebla knabo. 65/1. *(Tárkony)*
László Kálmán: Dancas la Parnaso. 64/3. *(Spita)*
Lengyel László: Unu historio en kvin ĉap. 65/2.
Mikszáth Kálmán: La vidvineco de . . . 61/3—4. *(Tárkony)*
Mikszáth Kálmán: Glogova antaŭlonge. 63/1. *(Somlai)*
Mikszáth Kálmán: La maljuna onklo. 63/3. *(Balkányi)*
Mikszáth Kálmán: La prudenta Naŝtja. 66/3. *(Ujlaky)*
Mikszáth Kálmán: La ŝuldo de Anna Bede. 67/3. *(Szalay)*
Mikszáth Kálmán: La ĉevalo . .. 69/1. *(Vári)*
Mikszáth Kálmán: La majstroj de signoj. 70/1. *(Tóth J.)*
Moldova György: La turnebla soldato. 69/2. *(Tárkony)*
Móra Ferenc: De kiam estas nigra . . . 61/2. *(Tárkony)*
Móra Ferenc: La ĉagreno de l'reĝo . . . 62/2. *(Ujlaky)*
Móra Ferenc: Septembra memoro. 64/4. *(Tárkony)*
Móra Ferenc: Tiu malbona infano. 68/4. *(Szalay)*
Móricz Zsigmond: Sep krejceroj. 61/3—4. *(Szalay)*
Móricz Zsigmond: Suzanna en Klagenfurt 63/1. *(Tárkony)*
Móricz Zsigmond: Jóska Samu Kis. 68/3. *(Nyitray Kr.)*
Nádas József: Konfeso. 67/4. *(Kökény)*
Nagy Lajos: Cerbopley havas . . . 63/3. *(Tárkony)*
Németh Géza: Kiu kiun elektas? 62/2. *(Balkányi)*
Németh Géza: Kiu kion respondas. 62/4. *(Balkányi)*
Neruda: La granda pokalo. 69/3. *(Kalocsay)*
Örkény István: Unuminutaj noveloj. 69/1. *(Tárkony)*
Örsi Ferenc: Unu el la 30 milionoj. 65/2. *(Benczik)*
Palotai Boris: La pendmaŝeto. 67/1. *(Kalocsay)*
Ruffy Péter: Brilo de la maljuniĝo. 64/3. *(Tárkony)*
Simon Endre: La ondoj. 66/4. *(Polacsek László)*
Simonffy András: Bonega tago. 69/3. *(Tárkony)*
Sólyom József: Ŝi tamen estas patrino. 63/3. *(Szerémi)*
Somogyi T. S.: Koni. 69/2. *(Tárkony)*
Szabó László: Tri lundoj. 63/4. *(Kökény)*
Szabó Magda: La rolo. 68/3. *(Tárkony)*
Szakonyi Károly: Laŭvorte. 70/2. *(Tárkony)*
Szent-Györgyi Albert: La atomo. 69/2. *(Somlai)*
Szerb Antal: Amo en la botelo. 64/1. *(Tárkony)*
Szirtes Ádám: Mi fariĝis homo. 65/1. *(Botos)*
Tabi László: Tri humuraĵoj. 65/2. *(Kalocsay)*
Tardos Tibor: La nigranaza. 63/4. *(Tárkony)*
Tatay Sándor: La memorlibro. 68/3. *(Gyulai)*

Tersánszky J. J.: Novelo pri novelo. 68/4. *(Halka)*
Tóth Árpád: La saniĝo de reĝo . . . 63/3. *(Benczik)*
Tömörkény István: Tiel estis destinite. 67/3. *(Kun)*
Váci Mihály: Rozoj sur la glacio. 68/1. *(Tárkony)*
Zágon István: Satiro. 62/4. *(Újlaky)*

F a b e l o j:

Fáy András: Tri fabloj. 65/3. *(Szalay)*
Fehér Klára: Historio pri la figo. 67/3. *(Vári)*
Szász L. Irén: Stelo sur la ĉielo. 68/1. *(Lukács Ágnes)*
La diamantmonero. 65/2. *(Nagy)*

INDEKSO PRI MENCIITAJ AUTOROJ

Andersen. 68/1: *Balkányi*
Barbusse. 64/4: *Reininger*
Dante. 63/1. *L. T.* — 65/1: *Kökény* — 66/4: *Szathmári*
Fekete István — 70/4. *Balkányi*
Gorkij. *Lengyel Béla.* 68/3: *Balkányi*
Jókai Mór — 68/4. *Ujlaky*
Nazim Hikmet. 64/2: *Benczik*
Romain Rolland. 61/3—4: *Kökény*
Rustaveli. 67/2: *Szerémi*
Shakespeare. 64/3: *Kökény*
Tolstoj Lev. 68/2: *Farkas Ernő*

ESEOJ

Jáki Ferenc: E. kaj la mondliteraturo 68/2.
Radó György: Loko k valoro de la E-tradukoj de „La Tragedio de l'Homo". 70/3.

ORIGINALA PROZO

Baghy Julio: La ŝuflikisto 61/3—4. — Legendo kaj historio 62/1. — La teatra korbo 63/2. — Granda ludo (sceno) 64/1. — Praktika instrumetodo 64/2. — Fraŭlino Degel 64/3. — Tri kamaradoj 64/4. — Eterna pentrado 65/2. — Pala romantiko 65/3. — Ĉu sukceso aŭ fiasko. 66/2. — Intima vespero 67/1.
Bálint Szilárd: La gustumaĵo 65/1. — Ĵaluzo sur lokomotivo 65/4. — Fablo pri la milito 66/2. — Rompŝtelisto en la vilaĝo 67/1. — La sekreto de la riĉiĝo 68/1. — La embarasita rendevuo 67/4. — La petolema telefono 69/1. — Tiel komenciĝis 70/1.
Benczik Vilmos: Akcidento 69/3. — Morto de Ŝanek 70/2.
Balkányi Pál: Kverelo ĉe la lago 66/1. — Leciono 66/2. — La ĉioscia princino 68/2.
Gergely Mihály: Babela aventuro 68/2.
Grand Palma: Demoneto kaj sorĉisto 66/1.
Kalocsay: La plej belaj vortoj. — 70/1.
Reto Rossetti: Sur la kapo 67/4.
Schwartz Raymond: Botoĉel 70/3.
Szabó Andreo: Mesaĝo de la hejmo 63/3. — Pravo post jarmiloj 65/4. — La gurdo 67/3.
Szathmári Sándor: Genezo 65/2. — Enciklopeditis 66/4. — Pythagoras 67/3. — Kain kaj Abel 68/4. — Tria preĝo de Pygmalion 69/2. — Donna Juana 69/4. — La falsa aŭguro 70/2.

FABELOJ:

Kökény Lajos: (en drameca formo) 62/3, 63/1, 64/1, 67/2.
Nádasdi Márta: 67/1, 68/4.
Regőci-Szabó Elizabeta: 67/2.

TRADUKITA POEZIO

Ady Endre: Sur la ĉaro de Elio. — Kanto de hungara jakobeno. — Neĝmontoj kaj Riviero. — Post Maja pluvego. — Virinoj sur la bordo. — Maria kaj Veronika. — Konservi vin . . . — La leĝo de la granda mano. — Aŭtuna bruo. — Kanto kronika el 1918. — 63/2. *(Kalocsay)*
Arany János: Laslo V. 63/1 kaj 64/2. *(Kalocsay)* — Dante. 63/1. *(Tárkony)* — Civilizo. — Sangjuĝo. — Popolkanto. 63/1 *(Kalocsay)* — En senfrukta horo. 66/4. *(Tárkony)* — Pont-inaŭguro. 66/2. *(Kalocsay)* — Familia rondo. 67/2. *(Ujlaky)* — Klara Zách. 67/2. *(Kalocsay)*
Babits Mihály: Inter eternajn aĵojn . . . 64/3. *(Tárkony)* — La Danaidinoj. — Fortissimo. — Cigano en mortkondamna ĉelo. — 64/3. *(Kalocsay)*
Benjámin László: Du jardekoj. — 69/1. *(Kalocsay)*
Berda József: La bakistjunuloj. — 70/4. *(Tárkony)*
Burns: Mia bela Mari. — Tre junas mi por nupti. — Maljuna edzo. 68/1. *(Rossetti Reto)*
Csoóri Sándor: Ke mallumo ne estu. — 69/2. *(Kalocsay)*
Donászy Magda: La grilo kaj la formiko. — 66/4. *(Vári)*
Dutka Ákos: Balatona fiŝisto. — 70/2. *(Rados)*
Eminescu Mihail: Sopiro. — 64/4. *(Kalocsay)*
Füst Milán: Letero pri Edipo. — 70/2. *(Kalocsay)*
Hollós Korvin Lajos: Patruj' vi estas fine. — 70/1. *(Szondy)*
Janus Pannonius: Al iu, amanta nur malnovajn librojn. — Al Silvia. — Pri papo Paŭlo. — Li ekskuzas sin, ĉar . . . — Elegio pri Barbara. — La transdanuba migdalarbo. — Por la paco. — 62/3. *(Kalocsay)*
Gilgameŝ: La morto de Enkidu. — 68/1. *(Kalocsay)*
Heine Heinrich: La sklavoŝipo. — 61/3—4. *(Kalocsay)* — La poeto Firdusi. — 62/1. *(Waringhien)*
Hungaraj kantoj: 68/3. *(Kalocsay)*
Illyés Gyula: Montriĝas. — Tegolmetistoj. — Poetoj inter si. — Domflanke. — Transformiĝinta knabino. *(Kalocsay)* — Mondkonkero. — La Maro. *(Tárkony)* 66/3.
Jobbágy Károly: Sen ŝirmoreto. — En knabina klasĉambro. 68/1. *(Ujlaky)*
József Attila: Medaloj. — La porkpaŝtisto. — Lulkanto. — Panjo. — Mia patrino. — Ĉe Danubo. — 61/3—4. — Ĉe la urborando. 65/3. *(Kalocsay)*
Juhász Gyula: Anna eterna. — 62/1. La laboro. — Prologo por laboristaj esperantistoj. — Kia estis. — L'infanon, dum li dormas. — La eterna tapiŝo. — 64/1. — Sur barbsekiga benko. — 65/1. *(Kalocsay)*
Kassák Lajos: La zorgoj de soleca viro. — Ekvilibro. — Deziro. — En bona horo. — La realaĵo de nenio. — La gardanĝelo. — 65/4. *(Kalocsay)*
Komját Aladár: Rekrutiĝo. — Voĉo de hungaraj malriĉuloj. — Ama poemo. — 61/1. *(Kalocsay)*
Kosztolányi Dezső: Kio postrestis. — Rozkolora lampo. — Kvieta pura poemo. — Malbona poeto, kiel kortuŝa . . . — Admono por la respekto de maljunuloj. — Kiu hodiaŭ mortis. — Flago. — *(Kalocsay)* — Post via jar' kvindeka. — Senbirda arbo. 66/1. *(Tárkony)*
Lucretius: El „La naturo de l'aĵoj". — 67/3. *(Kalocsay)*

Luu Trong Lu: Ankoraŭ ŝvelas odoroj. — 68/4. *(Kalocsay)*
Madách Imre: El "Tragedio de l' Homo" (finalo de la Londona bildo) — 64/2. *(Kalocsay).* — Recenzo 66/3. *Tárkony.*
Martialis: Epigramoj. — 67/3. *(Kalocsay)*
Mezei András: Pri l' mondo parolu. — 66/2. *(Kalocsay)*
Nagy László: Himno en ĉiuj tempoj 69/4. *(Kalocsay)*
Niit Ellen: Vizio — Lasu min esti birdo 65/3. *(Hilda Dresen)*
Petőfi Sándor: Arb' mi estas. — La popolo. — Bordo ĝin surflugis. — La stepo en vintro. — Ekstere ege frostas . . . — 61/1. Ribelis muĝe maro. — Eŭropo mutas — 62/1. — En la memorlibron de Etelke. — Al Etelke. — Fine de septembro. — La poetoj de la XIX. centjaro. — Por Laĉjo Arany. 68/2. *(Kalocsay)*
Pilinszky János: Harbach 1944. 70/1. *(Kalocsay)*
Pottier-Degeyter: La Internacio. 61/2. *(Kalocsay)*
Quang Huy: Birdflugiloj. 68/4. *(Tárkony)*
Radnóti Miklós: Infanaĝo. — Arbaro. — Komparo. — Vintro. — *(Tárkony)* — Kiel mi scius. — Sepa eklogo. — „Razglednica". — *(Kalocsay)* — Paco, teruro. *(Tárkony)* 65/1.
Rákos Sándor: Heredaĵo, — Sovaĝbesto. 69/2. *(Kalocsay)*
Rudnai Gábor: Ama paro. — Soleca cedro. — *(Tóth János)* — Puto de Maria. — *(Kalocsay)* 70/1.
Simon István: Nuksoŝelo. 64/3. *(Varga Gyula)* — Sur malnova terpoma veturilo. — El vortoj vivo. 69/3. *(Kalocsay)*
Szabó Lőrinc: En la arbaro de l'envio. — Lóci faras poemon. — *(Tárkony)* — En pezaj tagoj. — Nokto inter montoj. — *(Kalocsay)* 66/4.
Szécsi Margit: La ekflorintaj manoj 69/4. *(Kalocsay)*
Tóth Árpád: Sangjuĝo — *(Tárkony)*, Flamo. — Marto. — De animo ĝis animo. — La nova dio. — Aprila capriccio. 63/3. — Aprilo. — 64/1. — Elegio al genistarbeto. — 68/3. *(Kalocsay)*
Váci Mihály: Luno kaj stelo polusa. — 69/2. *(Kalocsay)*
Várnai Zseni: En kor' de l'milionoj. — *(Kökény)* — Ne pafu fil' — *(Újlaky)* — Ĥoro en soprano. — *(Baghy).* 67/4.
Vörösmarty Mihály: Proklamo. 61/2. — El „Csongor kaj Tünde". — Pensoj en biblioteko. — En la Gutenberga albumon. 64/4. *(Kalocsay)*
Weöres Sándor: Produktantoj. 65/2. *(Boldog Géza)* — La parolanta fonto. 70/2. — El „Orbis Pictus", 11 poemoj. 70/3. *(Kalocsay)*
Zólyomi Erzsébet: Katarina Hámán. 61/3. *(Baranyai)* —

ORIGINALA POEZIO

Auld William: Memore al Ferenc Szilágyi. 68/2. — La pasinteco ne ekzistas. — Novembra spleno. — La gardantoj. — Mia filino dektrijara. — Koŝmaro. 69/1.
Avar Pál: Balada amo. — Nupto. — Interna monologo. — Mallaŭte nur. 69/3.
Baghy Julio: Sklavokanto 61/1. — Letero el Udmurtio. 61/2. Saluto al la IEVK en Budapeŝt. — Fabeleto al Ági Tolnai. 61/3—4. — Danuba voĉo. 62/1. — Alo Dino kaj la edzina ruzo. 62/4. — Zanahari kaj Zatovo. 63/1. — Sagaca knabino. 63/3. — Vesperiĝas vagabond' — kun muziknotoj de *Sárosi.* 64/2. — Ho ruĝa rozo. 64/3. — La rusa samovaro. 65/1. — Deziro kaj grandveziro. — Cirka ĉevalo. — Jen nia voĉo. — Papilioj. — Piramidoj kaj kanaloj. — Sub sunlumo. 65/4. — Incendio. 66/3. — La Majstro mortis. 67/2. — Konfeso. 67/3. — Aserto kaj refuto. 68/4.
Balkányi Pál:. El la zime-zum kantetoj. 67/1. — Pri la elefanto en Azio. 67/3. — Nia hundo. 68/2.
Baranyai Imre: Ĝis la venk' — 61/2. — Tiam. — Dimanĉa tagiĝo. — La kruda somero. — La ĝardeno de l'patrino. — Martelkanto. — Ripozi. — Trompiĝo. — Rikolto. 62/2. — Virinaj varmsinoj. — Vane. 62/2.
Benczik Vilmos: Dum vespera horo. 63/2. — Fideleco. 65/1.
Boulton Marjorie: Lasta letero (al Baghy) 68/4.
Dresen Hilda: Por kiu kukulas kukulo ? — Mi nenion scias. — Anemonoj. — Volis vi. — Kion diri, kiel miri. —Mi siringoflorojn havis. 69/2.
Jevsejeva Ludmila: Foriris poeto (J. Baghy) 67/3.
Hlavaty Attila: De tag' al tag' — Infaneca sento. 69/4.
Horváth József: Deziro — Renkontiĝonte — Paraŝuta salto. 69/4.
Kalocsay Kálmán: Patrujo mia. — Senrezerve. 70/1.
Kock, Erwin de: Soneto. — Vekite. — Nokturno. — Sud-Afriko. 69/3.
Ponori Thewrewk Aurél: Kiel forgesi. — Kreinto-sorto. — Astra inaŭguro. — Elegio de la feliĉo. — La ventego. 69/1.
Tárkony Lajos: La torĉo. 61/1. — Al Hilda Dresen. — Al perdita amiko. 61/3—4. Pécs. 62/1. — Esperanto. — En hospitalfenestro. — Manĝigis vi kolombojn. — La tapiŝo. — Kvaroj. — 62/4. — La unua de majo. 63/2. — Vespere ĉe la stacidomo. 63/3. — Verda Helikono (kvarversaj poemetoj pri famaj aŭ konataj esp-istoj). 63/4. — La bobenoj. 65/1. — Lagborda memoro. 65/2. — La floso. — Markizaj insuloj. — La skulptistoj Paskinsulaj. 65/3. — La Elizabeta-ponto. 66/2. — Esperanto. 69/3. — Xerxes. — Mezepoko. — Venuso. — Trans la vivobordo. — Adiaŭo. — Aŭtuno. 69/4. — 25 jaroj en Budapeŝto. — Kunmanĝantoj 70/3.
Varga Gyula: Fundamento. 63/3. — Soleca tajpistino. 65/2.
Vahen-Svetinov Damjan: Urbo Sunbrila. 68/4.

VERKISTOJ KAJ POETOJ DE ESPERANTO

Zamenhof, lia verkaro. 66/4: *D. Buŝs*
Baghy Julio: 61/1: *Kökény* — 62/2: *Fancsali* — 64/1: *Szerémi* — 65/4: *Szathmári* — 67/2: Lia morto — 67/3: Adiaŭo, *Újlaky* — 66/4. 67/1, 68/4: Mozaikoj, kol. *Kökény* — 69/3, 69/4, 70/2: Diskuto pri lia verkaro: *Benczik, Kökény, Rados, Auld, Szathmári, Bácskai, Régulo*
Balkányi Pál: 64/1: *Kalocsay*
Bánó Miklós: 64/4: *Balkányi*
Baranyai Imre (Emba). 62/2: *Kalocsay*
Bodó Károly: 63/2: *Kalocsay*
Budapeŝta Skolo. 67/1, 67/2: *Waringhien*
Dresen Hilda: 66/4, 69/2.
Kalocsay Kálmán. 61/1: *Kökény*, 62/1, 66/3: *Szathmári*, 66/3: Mozaiko — *Kökény*
Szathmári Sándor. 68/1: *Kalocsay*, 70/4: *Benczik*
Szilágyi Ferenc. 65/3: *Kalocsay*, 68/1: *Kökény* — 68/2—3.
Tárkony Lajos. 62/4: *Kalocsay*

LIBROJ — RECENZOJ — REVUOJ

Bácskai: Fervoja terminareto. 69/4. Rec. *Fenyvesi*
Baghy—Kalocsay: Ora Duopo. 67/1. Red. *Kökény.* — Rec. *Balkányi*

Bagĥy: Ĉielarko. 67/3. Rec. *Vári*
Balázs Béla: La sep reĝidoj. 70/4. *(Farkas Éva).* Rec. *Jáki*
Boulton Marjorie: Nigraj okuloj. 68/2. Rec. *Szathmári*
Dorozsmai: Fabeloj. *(Szabó Valéria)* 69/1. Rec. *Völgyi*
Fekete István: Vuk. *(Leszkó Margit)* 67/1. Rec. *Szathmári*
Janikovszky: Ĉu ankaŭ vi? *(Szathmári)* (67/1. Rec. *Benczik M.*
Ho Ŝi Min: Memorajoj. 63/2.
Huu Mai: La lasta altajo. 64/4.
Jánossy L.: Pensoludo pri la temporitmo . . . 69/3.
Kalocsay: Waringhien: Plena Gramatiko. 65/2. Rec. *Mátéffy*
Kalocsay: Vojaĝo inter la tempoj. 67/1. Rec. *Botos*
Lenin k la latva revolucia movado. 70/4.
Lorca: Poemaro. *(Gusev)* 69/2.
Madách: Tragedio de l'Homo. *(Kalocsay)* Rec. *Tárkony* 66/3. — *Szathmáry* 68/3.
Majakovskij: Bone. *(Gusev)* 68/4.
Norda Prismo. 68/4. Rec. *Kökény*
Pechan: Gvidlibro II. 68/2. Rec. *Auld* kaj *Reto Rosetti*
Pechan: Turisma Vortaro. 69/1. Rec. *Jáki*
Sánta Ferenc: Dudek horoj. Rec. *Szerémi.* 67/1; *Lesznai* 68/3.
Selye: „La strečo de la vivo". 70/3. *Avar Pál*
Petőfi: Libero kaj Amo. *(Kalocsay)* 70/4. Rec. *Jáki*
Setälä: Fortoj de l'vivo. 68/1. Rec. *Balkányi*
Shakespeare: Somermeznokta sonĝo. *(Kalocsay)* 69/3. *Waringhien*
Szathmári: Maŝinmondo. 65/2. Rec. *Lesznai*
Szerdahelyi: Esperanto —2. Daŭriga. 69/3. Rec. *Völgyi*
Tárkony: Soifo. 65/2. Rec. *Benczik*
Tárkony: Revuo de revuoj. 69/4., 70/1—4.
La libroj kaj la legado. *Fenyvesi.* 70/4.
La historio de la h. libro. *Toldi-Varga.* 67/3. *(Mátéffy)*

LINGVO — LINGVISTIKO

L. Dernői Kovács: Bárczi: La romano de la h. lingvo· 64/3. *(Balkányi)*
Botos Imre: Lingvaj klarigoj ktp. en preskaŭ ĉiuj numeroj de 1961—68. — Por la unueco de la lingvo internacia. 64/1. — Kiel la maŝino analizas la frazojn. 66/3. — Pri nia lingvouzo. 68/4.
Germanus: Lingvaj problemoj. 62/3. *(Újlaky)*
Jáki: E. kaj la problemo de la scienca mondlingvo. 67/2. — La finna—hungara lingvoparenceco. 69/2.
Kalocsay: Hungarismoj en E. 63/1. — Lingva rastado. 64/4. — Kazinczy k la lingvonormigo. 63/3, 63/4. — Domfabriko (laŭ manuskripto de Ada Csiszár). 68/2, 69/3, 70/1, 70/2. — Lingvaj problemoj en radio. 68/4.
Korach Mór: Kontraŭajoj kaj konformajoj de la teknikaj-sciencaj lingvoj. 64/1. — E. kiel scienca lingvo. 67/1. — Pensoj pri la lingvo internacia. 69/3.
Simonyi Zsigmond: H. elementoj en la lingvoj eŭropaj. 61/3—4.
Szathmári: E. — lingvo de la moderna tekniko. 67/2.
Szépe György:. La 10a int. kongreso de lingvistoj. 68/2.
Szerdahelyi: Reveninte . . . 68/4. — E. kaj la moderna lingvo-scienco 70/2, 70/3.
Újlaky: E-a sporta lingvo. 70/4.

(La dua parto en la 3-a n-ro)

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraj-pavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLATÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informilon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Telefono: 189—900/160

L. Tárkony:

REVUO DE REVUOJ

„Miaj ĝisnunaj revuadoj vekis nenian reciprokaĵon: mia revuo simple ne ekzistas laŭ la E-a gazetaro", mi plendis al amiko. „Ĉu vi ne scias, — li respondis —, ke la esperantistaj redaktoroj legas nur siajn proprajn verkaĵetojn?" Nu, mi opinias, ke eble li havas iom tro da galo·

La NORDA PRISMO (1970. 3.) prezentas gvidartikole kaj frontpaĝe la kuraĝan estron de la STAFETO-eldonejo, *Juan Régulo Pérez*. Ĉiel meritita honoraĵo estas tio, kaj la kvar lastaj alineoj de la artikolo de *P. Thorsen* krias en la animon de la tuta „serioza parto de la esperantistaro". — La poemo de *T. Rozevicz* en la bona traduko de *T. Tyblewski*, projekcias frapante sugestian bildon pri mondo, kie ekzistas nek alto nek fundo; kaj kie oni ĵetiĝas ĉien kaj nenien en „horizontala falado". Tamen, ni insiste jesas, ke ekzistas „en nia tempo" la bezono „konstrui novan adaptitan al niaj postuloj fundon". *S. Szathmári* kontribuis per „La Guarbo", sarkasma satiro pri superstiĉa kredo heredigânta tra jarcentoj kaj naskanta sange groteskajn epizodojn (domaĝe nur, ke kelkaj gramatikaj mallertaĵoj ne estis elsarkitaj, kaj ke la lasta alineo, sub la lasta steleto, havas nenian sencon). — La rakonto „Hypatia" de *Julia Pioro* havas ĉiujn bonajn kaj malbonajn flankojn observeblajn en la aliaj rakontoj de la aŭtorino: ŝi scias tre bone, legige rakonti, fari interesajn implikaĵojn kaj turnojn, sed fine la rakonto iel perdiĝas en densa nebulo, postlasante nenion, kion oni povus postpensi, kvankam la rakonto evidente estis skribita kun pretendo de pripensigo (parenteze: ĉu en „Cyrylo" ne troviĝas tro da ipsilonoj?). Sed ŝia poemo „kolora nokto" min vere plezurigis. — En „Unu temo: Du versioj" ni legas poemojn pri la striptizo: kvazaŭ konkurson inter *G. Mattos* kaj *W. Auld*. Se mi estus ĵuriano, mi voĉdonus por W. Auld, ĉar kiel ajn majstre parnasanas G. Mattos, lia Heredieska sonet-fino, laŭ mia modesta sento, estas maladekvata al la varietea spektaklo. — *John Francis*, ĝojige reaktiviĝinta, tradukis la poemon de Keats: „Odo al greka urno". Mi eldiru mian gratulon pri pluraj sukcesaj partoj, kaj mian bedaŭron, ke li provis enpremi la poemon inter la tro striktajn kadrojn de la E-a kvinjambo. Mi povus demonstri, kio multa tial perdiĝis neeviteble, sed mi gardas min de facile akirota ŝajno de supereco. — Pri la „Protesto" de *Edwin de Kock*, timante, ke mi lezos lian sentivecon, tamen mi devas diri, ke li povas kaj rajtas ja elvivi sian individuecon, sendependan de ĉio en la mondo, private kaj poezie, suverene kaj sinforgese, precipe por superbrui tion, kion aŭdi estas dolorege, sed proklame postuli kaj per tio deloge prediki tiun rajton ŝajnas al mi memdanĝera, ĉar lian predikon superkrios vortoj kiel Hiroŝima, Vjetnamio, Angolo ktp., ktp., se ne paroli pri regionoj al li pli proksimaj. — Tre plaĉis al mi, ke la revuo ne domaĝas spacon pri recenzoj.

En SENNACIULO troviĝas multo diskutinda, sed nun mi povas okupiĝi nur pri „Naciismo kaj sennaciismo", artikoleto de *Skeldido*. Li ne komprenas, „kial nacia forto, suvereneco kaj sendependenco estus antaŭaj kondiĉoj de kunlaborado kun aliaj landoj". Tamen, ĉu ekzistas io pli simpla? Sen suvereneco kaj sendependeco ne temas pri „kunlaborado", sed pri ekspluatado de la nesuverena nacio fare de la suverena. De tia ekspluatado klopodas liberiĝi ekzemple Ĉilio, Peruo, Bolivio. Nur se ili sukcesos, ili povos esti partneroj egalrajtaj. La unuiĝo de la mondo pasas tra la disnaciiĝo de la mondo, kiel ajn la kapoj kun „sana homa menso" pri tio sin ŝancelas.

En ESPERANTO DE UEA, la prezidanto *I. Lapenna*, gvidartikole, la plendojn pri regresoj de E-o diras senbazaj kaj ankaŭ malutilaj, ĉar apatiigantaj kelkmedie; sume superpezas pozitivaj faktoroj. Alia-artikole li donas konsilojn, kiel redukti misprezentojn de E-o en nacilingvaj gazetoj. Interesas skizo de Jaunwalks pri la latva lingvo. Ekscitas, ke la Bulgara Televido (adr.: Todor Straŝimirov 2. Sofia) dissendos per „Intervizio" E-ajn kanzonojn, se multaj spektantoj orienteŭropaj tion petos: *dependos do de ni*.

En HEROLDO de ESPERANTO (Nro 1498) *H. Tonkin* skribas pri TEJO-problemoj, speciale pri la „deklaracio de Tyreső", laŭ kiu „ne eblas paroli pri lingvaj problemoj sen preni pozicion pri sociaj problemoj"; por tio necesas „studado kaj esplorado, administra fortigo, aktiveco, edukado". — *C. G. Fighiera* (Nro 1491) rekomendas en nia movado „aktivan neŭtralecon"; t.e. „senpartie esplori kaj denunci la aktualajn mondajn problemojn (ekz. socia malegaleco en S-Ameriko), tamen sen alpreni dogmecajn aŭ partiecajn poziciojn". — Aktorino-kantistino *Danuta Alczewska-Klus* preparas en E-o unupersonajn operojn; en n-ro 1499 ni vidas ŝian portreton. — En la matĉo Schwartz-Lobut (ata/ita) *Schwartz* per sia letero de leganto (N-ro 1495), gajnis gravan poenton.

THE BRITISH ESPERANTIST ĝojigas per *Boulton*-poemo; siajn ĝardenlaborajn esperojn, penojn kaj fiaskojn ŝi rakontas en elegantaj versoj kun agrable spritaj turnoj, tre simpatia memironio: la poemo vekas bongustan rideton eĉ je la tria tralego.

Mi devas rezigni detalan raporton pri INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO, ĉar tiom da interesaĵoj ĝi enhavas, ke mi bezonus por ilia konigo tutan paĝon. Oni devas ĝin legi kaj studi.

„Kaj kio pri tiu salato?" — demandis mia malice kibicanta amiko (kun pli ol sufiĉe da galo) pri amaso da E-aj kajeroj (naciaj E-gazetoj), Nu, diskuteblas, ĉu al tia dissplitigo de fortoj ne preferindus ilia koncentrado. Aliflanke: informilo estas necesa ligilo en la nacia movado. Tial tiuj kajeroj (laŭnombre 14) meritus registradon, kaj oni eĉ povus el ili elpinĉi kelkajn sekvinberojn . . . Bedaŭre, la elĉerpiĝanta spaco diktas prokraston. Esceptita estu nur „La Skolta Mondo" (pli norvega ol la Norvega E-isto). Jen el ĝi informo ĝojiga: 5000 aĉetis la E-an lernolibron „La Ĵamborea Lingvo". Kaj jen timiga: „En Norvegujo oni parolas pri 'gazetara morto'; jam multaj el la norvegaj gazetoj malaperis pro ĝi." Terure! Ĉu ĝin ne kaŭzas ia epidemio eble atingonta ankaŭ pli suden?

Antal Münnich:

Komputado kaj l'estonto de l'Internacia Lingvo

Fina parto

Klaras do, ke la plej gravaj naturaj lingvoj havas — el la vidpunkto de l'komputa pritrakto — malavantaĝojn, kiujn Esperanto malhavas. Kompare je l'angla, la internacia lingvo havas tre malmultajn plursencajn vortojn. Eĉ tiuj povus facile esti eliminotaj, se la neologismofarantoj tiucele uzus siajn inteligenton, energion, kaj lingvoscion, anstataŭ idiote persekuti la prefikson *mal*. Kompare je l'ĉina, Esperanto havas alfabeton facile reprezenteblan sur eniga klavaro aŭ eliga presilo. Ekz. la ĝenerale uzata kodo ISO R 646 havas kvar liberajn poziciojn, kiuj povas esti uzataj por Ĉ, Ĝ, Ĵ, kaj Ŝ. Aldonante la konvencion, ke Ŭ estu reprezentata per W, kaj Ĥ per X, Esperanto estas facile kodigebla. Fine, kompare je l'rusa k. a. lingvoj, Esperanto estas tute senfleksia.

Sed ĉu oni ne povus arte fari lingvon speciale por komputado, kiu estus eĉ pli konvena tiucele, ol Esperanto?

Ekzistas du proponoj, neefektivigitaj, pri la kreo de tia lingvo.

N. Goshawk proponis t. n. numerlingvon. Ĝi konsistus el la dek ciferoj, krome el punkto, komo, ktp. Ĝi do ne estus parolebla lingvo, nur skribebla. La artikoloj de Goshawk estas sufiĉe nebulaj, sed oni povas konkludi, ke li pensas pri ia etendo de la U. D. K. (t. e. l'Universala Dekuma Klasifiko uzata de libraristoj). La etendo konsistus en la provizo per gramatikaj reguloj,kies aplikon esprimus cifer-afiksoj. Per tio oni povus konstrui verbojn, adjektivojn, ktp. krom la substantivoj, kiuj estus esprimotaj esence simile je U. D. K.

Estas maloportune, ke ĉi tiu propono estis prezentita ĝuste tiutempe, kiam la U. D. K. mem komencas esti malpli favorata de libraristoj. Ĝiaj ĉefaj malavantaĝoj estas ĝia rigideco kaj malfacila kreskigeblo. Ĝi, kiel ĉiuj aprioriaj artefaritaj lingvoj, tendencas fiksi la skemon de pensado, kaj malhelpas baze novajn ideojn. Tial la libraristoj iom post iom transiradas al la pli malrigida *temvorta metodo*.

La ĉefa eraro de Goshawk estas, ke li ŝajne kredas, ke ciferoj estas iel pli konvenaj por komputiloj, ol literoj. Ĉi tiu eraro baziĝas sur la miskredo, ke komputilo estas nur pli moderna speco de kalkulilo. Efektive interne de l'komputilo ekzistas nek ciferoj, nek literoj, nur elektraj signaloj. Ĉu ni rigardas ilin reprezentantoj de ciferoj aŭ literoj, tio koncernas nur nin, homojn, kaj ne la maŝinon mem. Por ni, lingvo skribebla per literoj estas preferinda, ĉar ĝi estas parolebla.

Se oni do efektivigus la proponon de Goshawk, tiam ni ekhavus apriorian lingvon de speco ofte proponata, sed neniam sukcese uzata (vidu Drezen: La Historio de la Mondolingvo). Ĝiaj malavantaĝoj estus neparolebleco, malfacila lernebleco, kaj malkonvena evoluigebleco. Ĝia ĉefa avantaĝo (ke numeroj pli taŭgas por komputilo, ol paroleblaj vortoj) estas iluzio baziĝanta sur la nekono de komputiloj.

La alia propono venas de prof. *T. Tarnóczy*, eminenta hungara akustikisto. Li antaŭvidas, ke post 5—10 jaroj oni perparole programos kaj funkciigos komputilojn. Li do skizas la fonetikon de lingvo, kiu faciligus la akustikan ekkonon de la vortoj. Tiu lingvo malhavus similsonajn konsonantojn. Ekz. el la triopo *z, ĵ*, kaj *ĝ* nur unu estas permesata; simile el la duopo *p* kaj *b*. Se oni decidas favore de *b*, tiam ankaŭ *v* devas malaperi. La ekziliĝo de *r* estas memkomprenebla; ĝi havas tro multajn prononcmanierojn. Ktp., ktp. Tarnóczy ankaŭ donas interesajn regulojn pri la permesataj sinsekvoj de konsonantoj.

Kia estus la lingvo konstruebla sur ĉi tiu fonetika bazo? Tarnóczy mem nenion diras pri tio. Sed nin ĝi tuj memorigas pri Volapük, kies karakteron ankaŭ fiksis ĝia nekutima fonetiko; la elimino de *r*, la evito de sinsekvaj konsonantoj, ktp. Rezulte la vortoj de Volapük, eĉ se ĉerpitaj el naturaj lingvoj, apenaŭ similis la originalajn. Tial Volapük estis malfacile lernebla, kio fine kaŭzis ĝian pereon. La lingvo proponata de Tarnóczy verŝajne estus same malfacila pro l'sama kaŭzo. Ĉi tio estus tro granda prezo por ioma simpligo de l'eble inventota son-rekonilo.

Ni povas do konstati, ke neniu el la du proponitaj (sed ne ekzistigitaj) lingvoj speciale destinitaj por komputila uzo ŝajnas preferinda al Esperanto. Nun ni povas respondi nian unuan demandon:

1. Esperanto pli bone taŭgas por perkomputila prilaborado ol la plej gravaj naciaj lingvoj. Ankaŭ inter la tiucele proponitaj artefarotaj lingvoj ne troviĝis pli avantaĝa.

Nia dua demando koncernas la konduton de tiuj komputistoj, kiuj konatiĝis kun Esperanto. La observo montras, ke la averaĝa eŭropa komputisto multe pli favore akceptas la ideon de artefarita internacia lingvo, ol la ne-komputfaka averaĝa eŭropano. Tiu ĉi fakto havas plurajn kaŭzojn. Unue, la komputisto ĉiutage laboras per artefaritaj lingvoj (programadaj), do ĉi tiu nocio ne estas ŝoke nova por li. La sensencan, sed de ĉiu Esperantisto bone konatan vortoŝuton, ke „artefarita lingvo ne povas vivi", oni neniam aŭdas de komputisto. Due, la eŭropaj komputistoj konscias, ke l'estonto de nia kontinento grave dependas de tio, ĉu ni sukcesos rompi la nunan monopolon de l'usona komputil-industrio. Evidentas, ke neniu eŭropa

Kandidateco antaŭ diplomo



La nomo de *László Lovász* sonas bone ne nur inter fakuloj, sed ankaŭ la publiko ekkonis lin antaŭ kelkaj jaroj en la ekscita finalo de la „Kiu kion scias?"-konkurso de la televido kaj oni povis jam plurfoje legi pri li en la hungaraj gazetoj.

Okaze de tio ni vizitis lin, ke en decembro de 1970 — ankoraŭ kiel universitata studento — li akiris sciencan gradon: post la defendado de sia disertacio pri *La disfaktorigaj problemoj de grafoj* li iĝis kandidato de la matematikaj sciencoj*.

— Ni eksciis, kaj ankaŭ la eventoj pruvas, ke apud viaj universitataj studoj vi trovas eblaĵon por akiro de pli vasta faka informiteco. Mi petas vin, bonvolu paroli pri viaj interrilatoj kun la reprezentantoj de la eksterlanda scienca vivo.

— Koncerne miajn eksterlandajn interrilatojn: mi ricevis plurajn invitojn, kaj tiel mi prelegis en Kanado, en la Germana Demokratia kaj Federacia Republikoj kaj vizitis ankaŭ aliajn landojn. La dumaj interŝanĝoj de la ideoj estis al mi vere utilaj. El tia vidpunkto estus tre bone viziti la Sovetunion kaj Usonon; tre multaj elstaraj matematikistoj laboras tie.

— Ni aŭdis, ke oni invitis vin en Usonon lekcii, por unu jaro. Ĉu vi ne kaptos tiun bonegan okazon?

— Nun ne. Mi devas fini la universitaton, poste okupi oficon kaj fari la komencantajn paŝojn en la laboro. Eble pli malfrue.

— Ĉu vi dirus ion pri via ekiro, pri via scienca modelo?

— Volonte. Mi estis ĉirkaŭe dekkvarjara, kiam mi decidis, ke mi estos matematikisto, aŭ iu tia, kiu okupiĝas pri matematiko. Tre multe helpis min la atmosfero de nia gimnazio nomata laŭ *Mihály Fazekas*. Nin, lernantojn de la klaso matematikfaka, multajn horojn semajne instruis universitataj profesoroj. Mia amiko, *Lajos Pósa* — kies unuaj sciencaj rezultoj devenas el lia bazlerneja aĝo — instigis nin, donis al ni solvendajn taskojn, kaj helpis nin en la solvo. Multege mi povas danki al miaj profesoroj, el kiuj mi elektis mian sciencan modelon: la antaŭ nelonge mortintan *Alfréd Rényi*.

— Kvankam la plej grandan parton de via tempo okupas la lernado kaj la scienca laboro — kiel ekzemple la partopreno en la redaktado de le fremdlingva revuo *Acta Mathematica* — tamen vi okupiĝas jam pri la sekvanta generacio de la matematikistoj, pri la — eĉ pli junaj — junuloj.

— Jes, mi regule instruis en fakrondoj, eĉ — kun mia edzino, *Katalin Vesztergombi* kaj mia amiko, *József Pelikán*, kiuj estas same matematikistoj — mi skribis libreton por ili pri la kombinatoriko. Ĉi tiu scienco-branĉo enhavas la grafteorion, al kio apartenas la temo de mia disertacio.

— Kiujn fremdajn lingvojn vi uzas en via laboro, kaj kiel vi opinias pri nia Esperanta lingvo?

— Mi parolas angle kaj germane kaj — bedaŭrinde nur malbone — ruse. Inter ili pleje mi bezonas la anglan, ĉar ĝi jam iĝis preskaŭ ekskluzive la lingvo de la sciencoj. Povas okazi, ke Esperanto estus pli facile lernebla kaj bone uzebla — tamen, por povi tion certe aserti, mi devus pli multe scii pri Esperanto, aŭ eĉ ellerni ĝin — sed sen ia ĝenerala rezolucio ĉi-rilata ĝia uzo ne estas realigebla.

— Se iu pensus, ke vi estas scienculo oldeska, distrita, tion ankaŭ mi kontraŭus. Se mi bone scias, vi volonte ludas tablotenison kaj briĝon.

— Vere, sed mia nuna plej kara hobio estas la *Go*, ludo japana, simila al la ŝako, sed en kelkaj vidpunktoj eĉ pli interesa.

— Mi dankas la intervjuon. Saluton!

— Saluton.

János Tóth

* Kandidato = sciencul-kandidato, scienca grado antaŭa al "doktoro" (scienculo).

---

lando kapablas tion fari sola; nepre necesas internacia kunlaboro. Tio necesigas unulingvan fakliteraturon. Komputisto povas aprezi kaj apreci la avantaĝojn de fakliteraturo en lingvo, kiu bone taŭgas por komputila prilaborado. Trie, persono kiu elektis la komputadon sia fako, ĝenerale estas novigemulo ŝatanta nekutimajn, nebanalajn ideojn. Estas karakterize, ke pli ol 80% de la komputistoj ŝatas la sciencan fikcion. La ŝafeca bleko „mi lernos Esperanton nur se ĉiuj lernos ĝin" estas tre fremda je l'avangardema komputisto.

Resume ni povas respondi nian duan demandon:

2. Komputistoj ekkonintaj Esperanton ĝenerale akceptas ĝin favore. Ili ne bezonas multan instigon por ekstudi ĝian perkomputilan pritraktadon.

Nun ni venas al nia tria kaj lasta demando: pri tio, kio finfine decidos la sorton de Esperanto. Ĉu la komputistoj rekonos ĝin?

Estus ĝojige, se ĉi tiun demandon oni povus jesi kun sama konvinkiĝo, kiel la du antaŭajn. Bedaŭrinde, ne tiel estas. La plimulto de l'esperantistaro tute ne konscias, ke la estonton de l'internacia lingvo decidos nek la registaroj, nek U. N., nek ia amasa postulo, sed nure nur la konduto de l'komputistaro. *La komputistoj havos kaj uzos internacian lingvon post kelkaj jardekoj. Post kelkaj pluaj jardekoj ĝi estos la internacia lingvo de l'scienca kaj teknika literaturoj, de l'internaciaj komerco kaj juro, de la trafiko kaj la radia, telefona, televida komuniko.* Se l'esperantistaro konigos sian lingvon al la komputistaro, tiu lingvo estos Esperanto. Se l'esperantistaro ankaŭ estonte kondutos kiel nun, simile je religia sekteto, je infanaro ludanta sekretan societon, je diletantaj mondsavemuloj, kiuj persvadadas nur unuj la aliajn pri sia pravo: nu, ankaŭ tio ne haltigos la ekeston de Internacia Lingvo. Sed tiu lingvo ne estos Esperanto. Ĝi estos tiu, kiun konos aŭ kreos la komputistoj

Jozefo Bata

La 13-an de marto 1900 naskiĝis Jozefo Bata, elstara batalanto de la hungara kaj internacia E-movado, iama redaktoro de „Internaciisto". Okaze de la 70-a datreveno de lia naskiĝo ni publikigas rememorojn de liaj iamaj kunbatalantoj, bone kontribuantajn al la historio de la laborista E-movado.

I.

Tie en Vieno ni kontaktiĝis kun bonegaj hungaraj esperantistoj: Jozefo Bata kaj lia edzino Margareta. Tiutempe ni loĝis en la lignodometoj de la politikaj elmigrintoj; la ejojn luis la la Aŭstria CK de Ruĝa Helpo. La polico ofte faris tie kontrolojn. Jozefo kaj Margareta estis tre mildaj homoj, sindonaj komunistoj-batalantoj. Por akiri panon, ili vendadis gazetojn. Vespere, kiam ni estis liberaj, ni vizitadis la Vienan laboristan E-klubon aŭ kunvenojn de la regionaj komitatoj, por aŭdi la tieajn raportojn pri Eo. Ofte venis tien kun ni Bata kaj lia edzino. (El artikolo de la bulgara „Narodno Delo".)

Belĉo Nikolov

II.

Iun tagon venis en nian oficejon hungaraj kamaradoj-geedzoj. Ili rifuĝis de la blanka teror-reĝimo de la tiama Hungario al Aŭstrio, estis de tie elpelitaj post kelka tempo kaj serĉis rifuĝejon en Germanio.

Joĉjo estis alta kaj magra viro de bela madjara tipo, kun grandaj nigraj okuloj reflektantaj inteligentecon kaj sinceron. Lia edzino, Manjo, estis vigla kaj serioza juna virino, montranta aktivecon egalan ĉu en la subteno, ĉu en la kritikado de ŝia edzo. Senhezite ili partoprenis en nia laboro kaj akiris nian plenan kontenton. Flue ili parolis Eon. Joĉjo estis bona organizanto kaj ĉiam plena de ideoj, kies realigon li volis al ni trudi kvazaŭ perforte. Lia dinamisma temperamento ofte trafis al obstaklo de nia prudento, aŭ — kial nei — de nia germana flegmo. Sed Joĉjo ne trankviliĝis facile, kaj ofte nia pasiveco — kiel li nomis ĝin — elvokis lian koleron. Tiam li iris apelacii al la sekretario de IFA (tegment-organizo de laborist-kulturaj organizaĵoj). — Dum tiu epoko la internacia E-movado venis en krizon pro la kontraŭmarksisma kaj kontraŭsoveta politiko de la SAT-gvidantoj. Nia plenum-komitato juĝis diktatora ilian sintenon kaj proponis kaj efektivigis eksiĝon el SAT. Inter tiaj cirkonstancoj el pluraj landoj venis sugestoj krei laboristan internacian organizaĵon, kies ideologia bazo ne estu nebula sennacieismo. (El artikolo en „Der Esperantist", 1969.)

W. Vildebrand

III.

Kiel ankoraŭ juna esperantisto, mi kontaktiĝis kun la centro de Germana Laborista E-Asocio (Berlino, Dirksenstrato). Mi tre estimis la tiean saĝan kolektivon: gajan, eĉ petolan kelkfoje, sed seriozegan, se temis pri aferoj seriozaj, precipe pri politiko, kaj pri ĉi tiu temis ja ofte. Tie mi konatiĝis ankaŭ kun Manjo kaj Joĉjo Bata. Ili aktivis dum la 133-taga Hungara Konsilia Respubliko, kaj kiam ĉi tiu estis dronigita en la sango de la plej bonaj el la hungara popolo, ili sukcesis fuĝi, trovis ĉe ni eblon daŭrigi sian laboron. Ilia vivo tiama povas ekzempli, kiel sufera ĝenerale estas la vivo de la politikaj elmigrintoj. La burĝa registaro tute ne sopiris bonvenigi revoluciulojn — des malpli tiajn kun praktikaj spertoj — el aliaj landoj. Ne eblis anonci sin laŭorde ĉe la polico, ne eblis trovi pagitan laboron, ne eblis lui loĝejon, eĉ mizeran. De kie do preni monon? En Germanio tiam estis sep milionoj da senlaboruloj, kaj ĝuste niaj klaskonsciaj prolet-organizoj konsistis preskaŭ nur el senlaboruloj, ili do povis doni nur subtenon pli ol mizeran. Tial niaj hungaraj amikoj loĝis kaŝe ĉe diversaj kamaradoj aŭ simple dormis en la oficejo sur breto super la enira pordo. Sofo, fotelo aŭ simila komfortego tute mankis.

Oni ne povas imagi pli diligentajn homojn ol Manjo kaj Joĉjo. Kiam mi, senlaborulo mem, venis en la oficejon je la oka matene, ili jam fervore skribis aŭ multobligis tekstojn, enpakadis gazetojn aŭ literaturon. Kaj vespere, ofte kunvenis tie la Berlinaj grupestroj kiam ili finis ĉirkaŭ la 22-a, la geedzoj ankoraŭ laboris.

En 1932 fondiĝis en Berlino Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) kaj Jozefon Bata oni elektis redaktoro de ties organo „Internaciisto". En la unuĉambra oficejo de GLEA ni konstruis lignan vandon, kreante tiel redakciejon 2×4 metrojn grandan; tie de tiam „regis" Joĉjo Bata, helpata de Manjo kaj de la mizere pagata kamarado Georg Richter. Ĉio rilata al Internaciisto — akcepto de manuskriptoj, redaktado, legado de presprovoj, preso de adresaj slipoj, enpakado ktp. — okazis en tiu kamero, kie preskaŭ ĉiam klakadis la tajpilo. Nur se en la GLEA-sekretariejo ekflamis vigla diskuto politika, aperis Joĉjo en la pordo por esti la plej atenta kaj interesata aŭskultanto.

Niaj fortoj ne sufiĉis bari la vojon al la faŝismo, kies veran fivizaĝon rekonis tiam nur la komunistoj, avertantaj kontraŭ ĝi senĉese, neniam ŝparante siajn fortojn kaj klopodegantaj krei komunan fronton kontraŭfaŝisman. Ĉio estis vana: la faŝisma teroro progresis rapide, senhalte. La hungaraj revoluciuloj, kompreneble, endanĝeriĝis unuavice: ili ankoraŭ pli malfacile povis sin kaŝi ol la germanaj kamaradoj. Tial fine de 1932 Manjo kaj Joĉjo decidis iri Sovetion, kaj ili sukcesis pri tio. Post kelkaj monatoj — jam regis la faŝisma pesto — ni informiĝis, ke J. Bata estis honorita kiel modela laboristo. Ĉu oni povus atendi alion?

La kruelan finon mi eksciis nur post 30 jaroj: li fariĝis viktimo de la senkompata periodo de „person-kulta" arbitrismo. Li restis fidela al la komunismo ĝis sia lasta spiro. Lia edzino povis pene transvivi kaj fine reveni en sian liberigitan patrion.

Elizabeta Schödl (GDR)

„Pasoj al plena posedo"

Reaperis perfektiga antologia lernolibro de W. Auld: 30 antologiaj literaturaj legaĵoj, vortara difino de 1682 novaj vortoj, 176 ekzercoj. 238 paĝoj, 2. — US dolaroj.

La unua eldono de la lernolibro de W. Auld por progresantoj renkontis tian sukceson, ke ĝi elĉerpiĝis en malpli ol unu jaro. La dua reviziita eldono aperis fine de 1970 en Praha, en 5200 ekzempleroj, kiel komuna eldono de Heroldo de Esperanto kaj Ĉeha Esperanto-Asocio.

La lecionoj baziĝas sur analizo de originala aŭ traduka literatura legaĵo verkita aŭ tradukita de fama esperanto-aŭtoro (de Dinwoodie kaj Privat ĝis Pumpr, Rossetti, Kalocsay kaj Zamenhof.)

La tradukaĵoj reprezentas dek-unu literaturojn, inkluzive de la ĉina, skota kaj aramea. En la fino de la volumo troviĝas listo de 88 konsilataj libroj kaj adresaro de Esperanto-Asocioj en 63 landoj.

„Heroldo de Esperanto" havas la sol-vendorajton por la tuta mondo, escepte de la socialismaj landoj. Por mendoj el la socialismaj landoj oni sin turnu al ĈEA Blanicka 4, Kralovské Vinohrady, Praha 2. (X)



LA EMBLEMO GARANTIAS LA KVALITON!

Fabrikas
modernajn,
longe daŭrajn meblojn

LIGNOINDUSTRIA KOOPERATIVO EN PÉCS

HUNGARIO

PÉCSI FAIPARI KTSZ

TEATRA KRONIKO

Beckett-dramoj en Budapeŝtaj teatroj. Samuel Beckett, la mondfama dramverkisto ne estas malofta gasto sur la hungaraj scenejoj. ,,La lasta sonbendo'' (Krapp's Last Tape) estis aŭdebla en la hungara Radio, ,,Atendante je Godot'' (En attendant Godot) estis prezentata sur la eksperimenta scenejo de la Thalia-Teatro. Laste, en la Madách-Teatro, oni povis vidi lian dramon ,,Feliĉaj Tagoj'' (Happy Days). Ni aldonu ankoraŭ, ke ĉiuj liaj dramverkoj ĝis nun eldonitaj jam aperis en hungara traduko. (Por ni, esperantistoj, povas esti interesa, ke plurajn siajn verkojn li kreis ne en la angla, gepatra, sed en ellernita lingvo, france).

,,Ho, kiel bela estas ankaŭ ĉi tiu tago'' — ĝemas Winnie, la heroino de ,,Feliĉaj Tagoj'', troviĝante en tia situacio, ke ŝi eĉ ne povas ŝanĝi sian lokon, ĉar ŝiaj gamboj sinkis sub la teron. ,,Denove unu el la plej belaj kaj plej feliĉaj tagoj!'', — ŝi diras jam enprofundiĝinte ĝis la talio sub la tersurfacon de duongloba formo. Jen la tipa ,,absurda dramo'', alivorte ,,antidramo'', en kiu ne ekzistas agado, drama intrigo kaj similaj dram-akcesoraĵoj, sed temas nur pri la nenieco de la homaj interrilatoj, pri la relativeco de la homa vivo. Winnie, la babilema damo, senfine klaĉadas al sia edzo kaj al siaj objektoj: spegulo, kombilo, dentbroso, ombrelo kaj revolvero, sed ŝiaj vortoj restas sen konvena respondo. Ŝin, kiun grade pli kaj pli glutas la tero, ŝia edzo neniel subtenas, helpas aŭ eĉ konsolas. Li ludas nur la rolon de aĉa rezonisto. Eble, ĉar li estas pli ol iom maljuna kaj laca viro. Eble, ĉar . . . sed nenion oni povas scii. — La ensemblo de la teatro, la eminenta triopo: *Klara Tolnay, János Koltai* kaj la reĝisoro *László Vámos* prezentis spektaklon vere modernan, vere teatran kaj samtempe fidelan al la verko. Mi opinias, ke la severa angla kritikisto *J. C. Trewin*, kiu en du artikoloj skribis kun granda apreco pri la hungaraj aktoroj, precipe pri *Miklós Gábor* en la roloj de Hamlet kaj Rikardo III., nun ree skribus, vidinte ĉi tiun produkcion: ,,Jen, post du daŭraj budapeŝtaj vizitoj — kun intertempo de ses jaroj — mi kredas, ke la hungara publiko iomete taksas sub ties vera valoro sian teatran arton.''

Pál Avar

La granda maleblo. La muta kantistino. Sur la studioscenejo de la Thaliateatro en Budapeŝto, la reĝisoro, *János Gosztonyi*, prezentis du unuaktaĵojn; li kvazaŭ verkis ilin por si mem, la reĝisoro. Ili montras unuparte la scenigan lerton de profesia reĝisoro, aliparte la influon de la ,,absurda teatro''. Fakte, pri la unua teatraĵo la aŭtoro mem konfesas, ke li lernis lingvajn trovaĵojn el la ,,Atendante je Godot'' de *Beckett*, kaj la dua peco jam per sia titolo aludas al la ,,Kalva kantistino'' de *Ionesco*.

,,La granda maleblo'' estas sceneja ludo daŭranta unu horon. En la vilon de granda majstro de butonmuldado penetras fremdulo kaj teruras la sinjorinon de la domo: oni ne povas scii, ĉu li estas rabisto, murdisto aŭ frenezulo. Kaj — en absurda situacio — komenciĝas dialogo, sed ĝi fariĝas pli kaj pli interesa kaj streĉa. Tiel, ke ĉi tie propre fiaskas la intenco de la aŭtoro, ĉar anstataŭ ,,antidramo'' disvolviĝas antaŭ ni ekscita sceneja ludo kun realisma animprezento kaj satira karakterizo; la absurdeco fariĝas nur dekoraĵo epok-moda. Ni sciiĝas, nome, grado post grado, pri motivo tre reala: la fremdulo, iama helpisto de la Granda Butonmajstro, volas reguligi kun tiu sian konton, ĉar tiu Grandulo iam lin humiligis, mistraktis, puŝis en mizeron de minuskomplekso, sento de malplivaloreco. Nun li volas sange venĝi kontraŭ li; de tio li esperas sian savon, la reakiron de sia memfido. Montriĝas tamen, ke liaj ŝancoj por tio estas magraj: lia ĝisrompe kurbigita spino ne povas elteni gravajn moralajn ŝarĝojn, kaj la Grandulo, kvankam li estas nur pseŭdograndulo, estas sufiĉe lerta, pli ĝuste seninhibicia, por ke li retroturnu la revolver-tubon al li direktitan.

,,La muta kantistino'' ne havas tian gvidlinion de agado. La aŭtoro volis per ĝi demonstri, ke ankaŭ en nia socio oni povas pasigi tutan horon per perfekte banala kaj ideale nenidira klaĉado. Ĉar tute kaj garantiite nenia okazaĵo okazas sur la scenejo, la ludon oni povus kaj pli frue fini kaj plu daŭrigi. Nu, ĝi daŭras proksimume unu horon, kaj tiun horon oni ne povas trovi enuiga, ĉar la aŭtoro liveras al ni dume amason da stilaj bravuraĵoj kaj brile amuzajn turnojn de interparolo. Riĉa je humoro kaj surkape starantaj ideoj, li montras amuzege, kiaj ĉe ni estas la bonhavaj filistroj, snoboj kaj akaparemuloj, nekulturitoj kaj malplenaj kapoj de gravega mieno.

En la du unuaktaĵoj granda surprizo estas la bonega rolokreo de *Józsej Kautzky*, precipe kiel butonist-helpisto preparanta venĝon, pli malpli sukcese kaŝanta sian minuskomplekson. Ankaŭ la ludo de *László Inke* kiel pseŭdogranda Majstro estas plena trafo.

KVK

Kuriozaĵo

9600 dolarojn pagis por sia flugbileto iu 80 jara hindua religia gvidanto de Londono ĝis Bombay. La bileto tial estis tiom multekosta, ĉar la pasaĝero luis la tutan unuan klason por ne esti eventuale devigata vojaĝi en sociato de virinoj. Nome lia voto malpermesas al la maljuna hinduo alrigardi deproksime virinon.

AKVO-ESPLORO
AKVO-ELTERIGO
AKVO-REZERVADO
AKVO-PURIGADO

PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX, HUNGARA EKSTERLANDKOMERCA ENTREPRENO POR PRODUKTAĴOJ DE PEZA INDUSTRIO
BUDAPEST, V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6., BUDAPEST 5. PF. 128. TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5. CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128. TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. B. P. 128. TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

Eldono de SAT, 1970. 1344 paĝoj, 30 bildopaĝoj. Formato 14.6 × 6.3 cm. Prezo: 26.10 usonaj dolaroj.

La monumenta verko, kies ĉefredaktoro kaj antaŭparolanto estas *Prof. Gaston Waringhien*, enhavas pli ol 15 000 vortojn kun ilia plejeble preciza senc-ekspliko en E-o, do pli ol la duoblon de la vortoj entenataj de Plena Vortaro, origino kaj unua ŝtupo de ĉi tiu kolosa entrepreno. Krom la „ĝenerala vortaro" kunmetita de la ĉefredaktoro, ĝi enhavas terminojn de 81 branĉoj kaj fakoj sciencaj, artaj kaj teknikaj, kolektitajn de ĉ. 50 ekspertoj de la respektivaj branĉoj kaj fakoj. Tio starigas antaŭ la recenzanto baron apenaŭ venkeblan: kiel li kuraĝus ja ŝovi sian diletantan nazon en la laboron de tiom da eminentaj specialistoj? Krome, kiel trovi spacon por la pritraktado, eĉ se li aŭdacus tion fari? Mi elserĉis en la „Lingvo Libro" (1935-a jaro) la „kritikan esploron" de la karmemora C. M. Butler pri la Plena Vortaro de SAT, kaj mi konstatis, ke en nia revuo ĝi okupus ok plenajn paĝojn dense presitajn.

Kompreneble, nenio estas perfekta, aŭ — eble pli ĝuste — nenio povas en ĉiuj siaj detaloj plaĉi al ĉiu. Sed mi detenas min de surpingligado de tio kaj alio el du motivoj. Unue, kompare al la tuta amplekso de mia recenzo, tiuj objetoj okupus neproporcie grandan lokon, kiel ajn malmultaj ili estus; due, estus ridinde arogi al si fari eĉ fragmenton de tasko plenumebla nur de pluraj komisionoj kaj de la tuta esperantista popolo uzonta la Vortaron. Mi pensas, cetere, ke en pluraj punktoj, en kiuj iu aŭ alia disopinias, grandparte la Vortaro venkos per la gravo de sia ekzisto. Des pli, ĉar en lingvaj aferoj la konsideroj de ĝusteco estas preskaŭ ĉiam pli malpli subjektivaj. Tia monumenta verko, eĉ sen speciala deklaro, per si mem elluktos por si povon decidigan.

La Plena Vortaro siatempe, dank' al sia tiama redaktanto *E. Grosjean-Maupin*, estis de gravega, se ne diri providenca signifo el du kaŭzoj. Unue, ĝi senembarasigis la tiaman Lingvan Komitaton kaj ties Akademion en la tikla problemo de la vort-oficialigoj, kiuj kirlis terurajn tempestojn; ĝi entenis, nome, multmulte pli ol estis la vortoj proponitaj por oficialigo, sed krude rifuzitaj de la L. K.-anoj; kaj ĉi tiuj P. V.-vortoj — inter ili multaj de zamenhofa deveno — fariĝis silente preskaŭ-oficialaj. Due, ĝi certigis la unuecon de la vortostoko, ĉar la nacilingvaj-Esperantaj vortaroj ĉerpis el ĝi kiel el fonto fidinda. Nun, ĉi tiu unueco etendiĝos al duoble tiom da vortoj kaj terminoj, ekzakte, sprite difinitaj per senc-ekspliko kaj per ekzemplaj frazoj.

Unuavice en la ĝenerala parto la uzanto povas ĝoji pri pluraj ekzemplofrazoj prenitaj precipe el la verkoj kaj tradukoj de Zamenhof, sed ankaŭ el aliaj renomaj aŭtoroj, parte markitaj ankaŭ per aŭtor-signoj. Krom la granda helpo, kiun la uzanto ricevas per tio pri la uz-nuancoj de la vortoj, tiu vera abundo da ekzemplo-frazoj emfazas okulfrape, ke ĉi tie ne temas pri vortfabrikado de artefarita lingvo, sed pri la registrado de la lingvouzado trovebla en la literaturo, en kiu la lingvo vivas. Kolekti tian maron da ekzemploj oni povis nur legante jaro post jaro kun krajono en la mano kaj notante la frazojn, en kiuj la kunteksto plej karakterize aŭ kun interesa nuancigo klarigas la precizan sencon de iu vorto. Admirinda pacienco, sankta fervoro kaj granda amo al la lingvo estas bezonataj por tia benediktana laboro, por kiu apenaŭ oni povas trovi vortojn inde dankantajn.

La Vortaro do certigas la unuecon de la lingvo koncerne la formon de la vortoj kaj koncerne ilian nuancon kaj uzeblaĵon. Sekve, ĝi estas nemalhavebla laborilo por ĉiu serioza esperantisto: ne estas imageble, ke oni povu fari bonan literaturan laboron, ne havante ĉemane por konsulto ĉi tiun trezorejon. Ĉi tio, tamen, levas gravan problemon: kiel ĝin akiru la t. n. „nepagipovaj" landanoj? Ĉu aceti ĝin kolektive kaj gardi en biblioteko facile alirebla por la kolektivanoj? Ĉu fari laŭ ĝi apartajn vortaretojn de la diversaj sciencaj-artaj-teknikaj branĉoj kaj de la literaturo-poezio? Mi ne scias. Sed ion oni nepre devas eltrovi, por ke ĉi tiu granda trezoro kolektita fariĝu havaĵo komuna aŭ almenaŭ havigebla de ĉiu esperantisto por la bono de nia lingva kaj literatura kulturo.

K. Kalocsay

LETERKESTO

Matjošaitis Vytas, Raseiniai, Vaistine. 100. Lit. SSR. — Vi stribis: „Mi ricevis unu numeron de Revuo Hungara Vivo. Al mi tre plaĉis. Bedaŭrinde, tie ĉi ne eblas aboni, sed mi volus legi konstante. Nun mi tre petas en HV anonci mian adreson. Mi estas 44 jara farmacisto." — Mi esperas, ke vi trovos hungaran amikon, kiu povus aboni por vi.

Jos. Svoboda, str. de la Konst. Biebel 2313/44. Ĉehoslovakio. — Ni ricevis vian artikolon, bedaŭrinde, ni ne povos ĝin publikigi. Cetere vi vidis en HV novan rubrikon, „Najbareco, amikeco", sed ankaŭ en ĝi ni povas aperigi nur mallongan artikoleton.

László Pontyos, Répceszentgyörgy, László Tolnai, Tokodaltáró, Jenő Dobi, Kecskemét, Gizella Kőszegfalvi, Hódmezővásárhely, dr-o Boldizsár Simon, Debrecen, L. Molnár, Székesfehérvár, István Molnár, Pécs, dr-o József Homoródy, Zalaegerszeg, Lenke Markó, Sopron, dr-o Gusztáv Kicsiny, Imre Kádár, Gyula, Mihály Kovács, Vasad, Elizabeta Asztalos, Kiskőrös, Ilona Osgyán, Bakonycsernye, kaj al aliaj: — Ni petas vian pardonon pro la ĝenado de nia erare adresita cirkulero. Dankon pro viaj laŭdaj vortoj, kaj pro via renovigita abono.

Conrad Fisher, R. F. D. 1. Meadville, Usono. — Dankon pro via letero kaj informo.

Aste Christensen, Blankarz, Kopenhago. — Ni respondos je via demando en letero.

La Tragedio del' Homo - opero

Ne estas necese prezenti al esperantistoj la grandiozan hungaran draman poemon *La tragedio del'homo* de Madách. La klasika kaj eternvalora literatura kreaĵo ricevis klasikan kaj senmortan esperanto-tradukon de K. Kalocsay; tradukon, ekzemplo-montran al ĉiuj esperanto-tradukoj de klasikaj verkoj.

Ĉi tiu muzika dramo estas ,,misterio-opero'', ĝi do reprezentas ion novan en la evoluo de la opero kiel artospeco. Lastatempe en multaj partoj de la kultura mondo ekestis diskutoj, ĉu la opero havas estonton, aŭ ne. La definitivan respondon povas doni antaŭ ĉio la bonaj kaj valoraj operoj mem. Kaj la kreo de tiaj operoj dependas antaŭ ĉio de la *muzikaj* solvoj, do de la talento de la komponistoj. Ankaŭ *La tragedio del' homo* estas unu el la respondoj, donitaj al ĉi tiu diskuto.

György Ránki, la komponisto de la nova opero apartenas al la plej talentaj komponistoj de la nuntempa Hungario, estas kreinto de multnombraj interesaj kaj altnivelaj muzikverkoj, kiuj parolas al la hodiaŭa homo kaj sciigas al li gravajn ekkonojn pri la vivo.

En mallonga informo pri nova opero ni ne havas tempon kaj eblon ĉi tie detale pritrakti la tekston. Sed, konjektante, ke rimarkinda parto de la esperantistaro bone konas la tradukon de K. Kalocsay, ni eĉ ne trovas ĉi tion necesa.

Kio estas la tasko de komponisto, se li kreas muzikon al dramo? Unuavice malkovri ties internan valoron, antaŭ ĉio la homajn sentojn en ĝi kaj prezenti ilin al la publiko.

Precipe la lasta postulo — la prezentado de la sentoj kaj pensoj de la dramo de l'*pasinto* al la *hodiaŭa* publiko — certigas grandan valoron al la nova opero de Ránki. La ĉefrolanto de la tuta verko estas Adamo, kiu ne nur rigardas la historian evoluon de la socio, sed ankaŭ persone partoprenas en la homaj-sociaj agadoj. Liaj luktoj en si mem, liaj internaj problemoj estas *niaj* spiritaj krizoj, *niaj* konsciaj problemoj. Kaj per ili ni ekkonas *nin mem* pli bone kaj antaŭ ni aperas pli klare nia devo, nia etika kaj praktika sinteno al la mondo, al la socio, al la homaro.

La teksto de *La tragedio de l'homo* pritraktas la sorton de la homo per sinsekvaj sonĝo-scenoj de Adamo en la biblia Paradizo. La vico de la scenoj montras psiĥologian kaj eĉ logikan ordon. La komponisto devis do inventi karakterizajn kaj esprimplenajn melodiojn kaj prilabori ilin. La plej elstara signo de muzika talento de Ránki estas la transiraj partoj de la opero. Estas muzikestetikistoj, kiuj opinias, ke la transiraj partoj de muzikverko estas la veraj pruvoj de la komponista talento. Ni pensas, ke ĉi tio estas prava konstato; ĉar la transiraj muzikaj partoj certigas la *organikan sinsekvon* de la diversspecaj melodioj kaj muzikaj prilaboroj.

La organikan unuecon de la nova opero-verko certigas la fakto, ke ne nur la transiraj partoj, sed la scenoj, do la tuto de la opero baziĝas sur kelkaj melodiaj ideoj, kiuj, de tempo al tempo revenante, esprimas sentojn, ideojn, pensojn.

La komponadon de la opero apogis la fakto, ke la tuta poemo enhavas multajn muzikajn momentojn, ekzemple la ĥoron de la anĝeloj, la ,,muzikon de sferoj'', psalmojn, kantatajn en la bizanca sceno, la Marseljezon en la Pariza sceno kaj plurajn aliajn. Sen akompana muziko la poemo ne povas esti prezentata; sed kiel opero la granda verko nun aperas la unuan fojon.

Kiel vera artisto, la komponisto sentis sia devo servi la eternajn valorojn de la poemo, proksimigante ilin al la nuntempa homo. Sed ĉi tion li povis realigi nur komponante valoran kaj en la plej bona senco de la vorto individuan muzikon, kiu kreas ĉiam la necesajn atmosferojn.

La muziko de Ránki estas ,,moderna'', do nuntempa koncerne la stilon kaj esprimajn rimedojn. Tamen ĝi estas bone komprenebla de la neantaŭjuĝa aŭskultantaro. Ĉi tiu fakto signas simpatian klopodon de la komponisto: esti proksima al la publiko, ne permesi, ke ekestu abismo inter muzikaŭskultantoj kaj muzikverko. Samtempe Ránki kreas *modernan* muzikon en la pozitiva senco de la vorto. Tiamaniere renkontiĝas la muzikaj-fakaj kaj homaj-etikaj trajtoj de la komponisto. Jen estas ĝenerala eco de altnivelaj kreantaj artistoj, kiuj montras vojon al la publiko, kompreni pli bone la esencon de la homa vivo kaj samtempe la plej gravajn flankojn de la homa interno, de la homa spirito.

La prezentado de la nova opero en la Hungara Operdomo de Budapeŝto starigis la reĝisoron antaŭ malfacilan taskon. La solvon de ĉi tiu tasko helpas la bona dramaturgia sento de la komponisto: li kreis ĉe la transiraj partoj pantomimajn grupajn dancojn, kiuj signas la ŝanĝojn de la scenejoj. Tiamaniere la alternoj de la lokoj kaj epokoj estas reprezentataj de pantomimaj grupoj ekz. egiptaj sklavoj, grekaj batalantoj kaj popolo, romiaj dibočuloj, francaj revoluciuloj ktp. La fundo de la scenejo restas ĉiam la sama — la stela ĉielo, la kosmo.

Lajos Lesznai

La dudekjara Hungara Ŝtata Popolensemblo

La dudekjaran jubileon de sia fondiĝo festas ĉijare la Hungara Ŝtata Popolensemblo. En diversaj festaj aranĝaĵoj ĝuas ilian programon la enlanda publiko, kiu en la lastaj jaroj jam tre malofte povis viziti la prezentadojn de la ensemblo, ili jam tiel multfoje rolas sur eksterlandaj scenejoj. Eksonas denove la grandsukcesaj perloj de ĉi tiuj dudek jaroj; verkoj, kiujn la entuziasma ensemblo popularigis en la tuta mondo. Kortuŝe estas, kiam la plejparte jam ŝanĝiĝinta ĥoro kaj orkestro prezentas la verkon ,,Kállai Kettős'', komponita de Zoltán Kodály speciale por la unua sinprezentado de la Ŝtata Popolensemblo, en la jaro 1951. Okaze de la dudeka naskiĝtago ankaŭ ni deziras multajn pluajn sukcesojn al la eminenta ensemblo.

SPORTO

AKVOPILKADO. Komence de januaro la 15an fojon disvolviĝis la Nederlanda internacia interkluba akvopilko-turniro Van Haselen. La turniron gajnis la akvopilko-teamo de la hungara sportklubo Egri Dózsa.

BOKSO. De la 10a ĝis la 15a de novembro oni okazigis la junioran Eŭropo-ĉampionadon de bokso en la Nordhungarlanda urbo Miskolc. La junaj hungaraj boksistoj brile batalis kaj akiris por sia trupo la unuaecon per 5 unualokaj, 2 dualokaj kaj 2 trialokaj klasigoj. Oran medalon gajnis Péter Glück en la pezogrupo (pg.) 38, Zoltán Kisnémeth en pg. 51, László Juhász en pg. 60, Károly Nemec en pg. 63,5 kaj József Réder en la pg. super 81.

GLACIHOKEO. Fine de decembro oni aranĝis glacihoke-turniron en la dana ĉefurbo. Venkis la hungara teamo kun golproporcio 33 : 16, post gajnitaj matĉoj kontraŭ Danlando, Nederlando, Norvegio, kaj sendecida matĉo kontraŭ Svedio.

SKETADO. En la unua semajno de decembro finiĝis en Varsovio la konkursoj de arta sketado kaj glacidanco, aranĝitaj okaze de la 50a datreveno de la fondiĝo de la Pola Sketartista Federacio. En glacidanco la hungara paro Berecz—Sugár — plenuminte la devigajn ekzercojn plej bone inter ĉiuj konkursantoj — atingis dualokan klasigon en la definitiva taksado.

SKERMO. Okaze de la memorkonkurso Francesco Mannino, disvolvita la 22-an de novembro en la Italia Catania, en la avanranga ensemblo de la spadado venkis d-ro Csaba Fenyvesi.

SKIADO. En Lauscha (GDR. Turingio) meze de januaro oni aranĝis orientiĝan konkurson de skiokuro por „IX. Internationale Rennsteig Pokal". La hungaraj virinaj skiistoj, kiuj partoprenis la konkurson la unuan fojon, plenumis la disciplinon kun vere elstara sukceso: ili akiris la tri unuajn klasigojn.

ŜAKO. Komence de januaro disvolviĝis la internacia ŝakturniro de Hastings en Anglio. En tiu turniro, aranĝata ĉiun jaron jam de 75 jaroj, la hungara grandmajstro Lajos Portisch gajnis pasintjare unualokan klasigon kaj — la *duonon* de la plurmil dolarojn valore ora statueto; la ora husaro. Ĉijare li denove venkis en la turniro kaj per tio li gajnis jam definitive la oran husaron. — En januaro finiĝis en Groningen (Nederlando) la junulara Eŭropo-ĉampionado de ŝako. La unuaecon akiris la juna hungara ŝakludisto Zoltán Ribli. — Same en Nederlando, en Beverwijk, la 30an de januaro finiĝis la lasta etapo de la Nederlanda internacia ŝakkonkurso. El la virinoj venkis la hungara Mária Ivánka.

TABLOTENISO. En la lastaj tagoj de novembro disvolviĝis en la sveda urbo Halmstad la skandinava internacia tablotenis-ĉampionado. En la finalo la hungara teamo venkis la jugoslavan teamon kun poentproporcio 3 : 0 (tri per nulo), la teamon de la ĉina popolrespubliko kun tiu 3 : 2 kaj la svedojn kun tiu 3 : 0. Per tio la hungara teamo akiris la titolon de ĉampiono. — En la tablotenis-turniro „Eŭropa Ligo" la hungara teamo — post 5 venkaj kaj 5 sendecidaj renkontoj — staras momente kaj verŝajne definitive sur la unua loko.

La ĉi-jaran, laŭvice la tridekunuan mondĉampionadon de tabloteniso oni aranĝis en la japana urbo, Nagoja. En la finalo de la disciplino vira parludo la hungara paro, *Tibor Klampár* kaj *István Jónyer* venkis la ĉinan paron Ĉuan Ce-Tung kaj Liang Ko-Liang. Kun la rezulto 3 : 1 (setoj 11 : 21; 21 : 16; 21 : 10; 21 : 16), kaj per tio ili gajnis la mondĉampionecon de vira parludo. **Tibor Újlaky-Nagy**

Sándor László Bencsik

Hungaroj en Azio

Por la hungara popolo — vivanta en la koro de Eŭropo — dum jarcentoj estis ekscita demando: de kie ni venis, kie estis nia prapatrolando, kie troviĝas niaj parencoj. Neniu popolo oferis tiom multe kiel la hungara kun tiu celo, ke ĝia deveno estu esplorita. La publika opinio ankoraŭ hodiaŭ mondvaste imagas nian lulilon sur la ebenaĵon de Mongolio. Sed la scienco jam delonge klarigis, ke la ugra popolo, el kiu niaj prauloj disiĝis antaŭ jarmiloj, vivis okcidente de la Uralo. Tamen, la esploristoj trovis parencojn ankaŭ en la koro de Azio . . . La rezulto de la heroaj-romantikaj esplorvojoj de hungaraj scienculoj, migrantoj, estis la klarigo de nia prahistorio, kaj samtempe, ĝuste pro tiu deven-esplorado, la hungaraj scienculoj fariĝis la plej famaj orientalistoj en la mondo.

De la 11. jarcento ĝis la unua mondmilito pli ol 150 hungaroj skribis sian nomon en la historion de la esplorado de Azio. En ĉi tiu artikolo oni ne povas mencii ĉiujn, eĉ ne eblas rakonti pri ĉiu scienca rezulto de la geografoj, lingvistoj, arkeologoj, antropologoj, folkloristoj, kartografoj, kuracistoj, Plejparte ili vojaĝis solaj, perpiede aŭ sur ĉevalo tra la dezerto de Gobi, tra Siberio, eĉ tra Himalajo (hungaro — *Ladislao Berzenczey* — estis la unua eŭropano, kiu ĝin trairis). La plej fama inter la prapatrolandserĉintoj estis *Sándor Kőrösi Csoma*, kiu malkovris la lingvon kaj kulturon de Tibet. Li estis ne nur heroo kaj granda scienculo, sed post la morto li fariĝis: sanktulo en Japanio, pro tio, ĉar li fundamentis — endanĝeriginte sian vivon — la modernan budhisman sciencon.

Krom la unuopaj esploristoj iris al Oriento ankaŭ ekspedicioj. Mondfama laŭ rezulto fariĝis en la 19. jarcento la ekspedicio gvidata de grafo *Béla Széchenyi* kaj la ekspedicio de grafo *Jenő Zichy*. Ankaŭ en la 19. jc. *Tibor Leitner* esploris la dardu-lingvon kaj malkovris la ekstremorientajn memoraĵojn de Aleksandro la Granda. Ĉe la komenco de la nuna jarcento la plej sensacian rezulton donis la arkeologia esploro de *Aurelo Stein*, kiu malkovris la grandan kulturon de la popoloj en Interna Azio.

Krom la esploristoj ankaŭ multaj migrantoj iris — plejparte el aventuremo — al Azio. Inter ili multaj fariĝis famaj homoj pro ia eksterordinara talento kaj faro. Nome, en Ĉinio, ĉe komenco de le 20. jc. vivis kelkaj

Szilárd Bálint

La konsiderema edziĝonto

Vojaĝante al Budapeŝto per nokta persontrajno, mi elektis malluman kupeon por iom dormi kaj sidiĝis en la kupeo apud ties pordo. Krom mi du viroj sidis tie vidalvide apud la fenestro kaj vole-nevole mi devis aŭdi la jenan konversadon:

— Kara Petro, mi diras sincere, ke tiu virino, kiun mi rekomendas, estas vidvino senkompara, kian vi certe ne trovos aliloke. Ŝi havas duĉambran loĝejon en la ĉefurbo kun plena komforto: varma kaj malvarma akvo, centra hejtado kaj ĉio dezirebla . . .

— Kara Paŭlo — diris la alia post kelka silento — vi scias, ke mi estas elektema koncerne virinojn, mi ne volas ja malagrabligi mian fraŭlan vivon ĝisnunan per miselekto . . .

— Sed tiu virino kuiras bonege, kaj bona manĝo, sciu, estas medikamento por viro.

— Nu, foje oni rekomendis al mi virinon pro ŝia bonega kuirarto. Ŝi invitis min por tagmanĝo kaj en la supo, en ties hepata knelo, mi trovis longan haron. Mi devis kun granda fortostreĉo subpremi mian naŭziĝon kaj rideti kaj laŭdi la supon . . . La dua plado estis anseraĵo kun rizo, mi prenis en mian teleron ankaŭ la anseran muskolstomakon, kaj, imagu, mi trovis en ĝi muelitan maizon kun kelkaj gruzeroj . . . Post la tagmanĝo mi iris al kuracisto por ellavigi mian stomakon . . . Mi petegas, ne parolu pri bona kuirado!

— Sed nun ne temas pri tia virino! Kiun mi rekomendas, tiu baniĝas ĉiutage, purigas la loĝejon du fojojn ĉiutage, lavas kaj brosas la manojn plurfoje kiel la kuracistoj.

— Foje vi rekomendis al mi virinon, kiu estis tiel pura, ke per lupeo ŝi ĉasadis la polverojn sur la pargeto. Ŝi estis ankaŭ ŝika kaj sprita, eĉ bela, ŝia tagmanĝo estis tre manĝebla, kaj ŝi pretigis al mi tian punĉon, ke pro ĝi la sango komencis en mi boli . . . Ŝi surhavis silkan negliĝon, kaj kiam mi ŝin brakumis, la negliĝo malfermiĝis kaj mi ekvidis ŝian ventron, sur kiu barba maristo kun longvosta simio estis tatuita. Mi tuj pensis, ke ŝi estas la ino de tiu simio, kaj mi sentis plenan mankon de povo ami ŝin tiel, ke ni havu infanon . . .

— Feliĉe, — respondis Paŭlo, — ke tiu virino jam havas du infanojn: dekses-jaran filon, dekok-jaran filinon.

— Mi legis iam svat-anoncon laŭ kiu la anoncantino estis 41-jara, 170 cm-ojn alta eksedzino. Ŝi skribis, ke ŝi laboras, havas ĉef-luitan loĝejon kun infanoj, kaj deziras konatiĝi kun serioza viro; devizo: „Ne bone esti sola". Mi informiĝis pri ŝia adreso kaj vizitis ŝin. Fiere ŝi prezentis al mi siajn naŭ infanojn, kiujn ŝi kolektis de siaj kvar eksedzoj. Mi miris iom laŭte pri ŝia „soleco" kaj ŝi diris, ke ŝi deziras al si novan edzon! . . .

— Efektive, elekti inter la virinoj estas tro malfacila problemo, — koncedis Paŭlo.

— Prave, — diris Petro. Tute alia afero estas ligi sin al virino junaĝe kaj maljuniĝi kune, ol ricevi preta ian oldulinon nur iele-tiele. Mi jam havas pli ol cent fotojn, multajn leterojn de virinoj, renkontiĝis kun ili en teatro, kinejo, sukeraĵejo, plej diversloke, sed mi tute ne povis elekti la konvenan.

— Kiom aĝa vi estas? — demandis Paŭlo.

— Ho, ne interese . . . Mi hezitadas, ŝanceliĝadas, sed fine restos al mi nenio krom edzinigi maljunetan virinon kun bela loĝejo . . .

— Tamen, diru, kiom da jaroj vi havas?

— Sepdek ses.

— Nu, — diris Paŭlo, — vi havos ja ankoraŭ tempon ĝis cent dudek!

Tiam ni alvenis Budapeŝton.

---

hungaraj mandarenoj . . . Por ekzemplo: *Edmundo Faragó* estis direktoro de la mara dogano. Sed la plej fama mandareno hungara estis *Jób Kompolthy*. Li estis 23-jara, kiam — post la dufoja ĉirkaŭŝipado de la tero — en la jaro 1902 li elŝipiĝis en Ĉinio. Post unu jaro li fariĝis mandareno: oni nomumis lin provinca poŝtdirektoro, kaj li ricevis por ĉi tiu ofico unu barĝon kaj la riveron Jangce (Ĉingĉiang). Kompolthy dum dek jaroj ŝipadis sur Jangce de Ŝanghaj ĝis Tibet, li trapasis la eŭropo-grandan teritorion kaj organizis la modernan poŝtorganon de Ĉinio — kun sukceso. Pro la granda laboro li ricevis de la ĉina registaro la Ĉia-ho-ordenon. Pri la dekjara vojaĝo li skribis notojn, kaj el la priskibo de la iama vivo de barĝoj sur la riverego oni povas rimarki, ke Kompolthy estis ne nur mandareno, sed krome kaj plie granda vojaĝanto kaj kreanto.

Kompreneble troviĝas spuroj en Azio ankaŭ de tiaj hungaroj, kiujn historiaj okazintaĵoj ĵetis malproksimen el la patrolando. Post la liberiga milito en 1848—49, militkaptitoj hungaraj en Siberio fondis propran vilaĝon, kaj nomis ĝin: *Kossuthfalva*. En la unua mondmilito jam miloj da hungaraj soldatoj falis en rusan militkaptitecon, kaj kiam okazis la Granda Oktobra Socialista Revolucio, el la hungaroj centmil fariĝis ruĝaj soldatoj, batalis kune kun la soveta popolo por la socialista estonto. Poste miloj el ili memvole restis kaj trovis novan hejmon en Sovetunio por la tuta vivo. Krom ili, dum la sekvaj jardekoj multaj homoj serĉis novan hejmon en Sovetunio, ili migris el Hungario parte el politika, parte el ekonomia kaŭzoj. Nun, aldonante tiujn, kiuj dum la periodo de la dua mondmilito atingis la malproksimajn orientajn landojn kaj poste restis tie — oni povas diri, ke vaste en Azio preskaŭ ĉie troviĝas hungardevenuloj.

Krom sur la soveta teritorio ankaŭ en Japanio, Ĉinio, Honkong, Indio, Indonezio, laŭ oficiala kalkulo troviĝas plurmil hungaraj metiistoj, komercistoj, intelektuloj kaj kamparanoj.

Kaj kio estas la situacio hodiaŭ? — En la nuna epoko la popoloj vivas en vigla kultura-ekonomia interrilato — tiamaniere ankaŭ Hungario sendas fakulojn por industria, agrara, geologia, lingvistika, folklora esploro kaj kunlaborado al ĉiu lando de Azio. Kaj la filoj de la orientaj landoj same vizitas Hungarion, eĉ multaj el ili lernas en niaj faklernejoj, universitatoj.

Tiel do — ni ankaŭ hodiaŭ daŭrigas la esplorvojaĝon tra Azio, en la spuroj de la iamaj scienculoj kaj migrantoj, ankaŭ nun estas konataj hungaraj fakuloj, orientalistoj, kaj, kvankam ni ne bezonas plu serĉi la prapatrujon, ĉar ni konas jam niajn parencojn, tamen ankaŭ nun estas ekscita tasko por la hungaroj: vojaĝi al Azio, esplori plue, viziti la multiĝintajn parencojn.

Tradukis: **Valeria Szabó**

EL LA LETEROJ

Jam pli ol ses jarojn mi legas vian revuon kun granda intereso, precipe pro la literaturaĵoj, kiuj enestas en via gazeto. Per ĉiu numero oni povas lingve pliperfektigi sin, kion oni ne povas aserti pri multaj aliaj gazetoj. La nova aspekto ankaŭ plaĉas al mi, kvankam kelkaj paĝoj estas uzitaj por reklamo. Al s-ro Lajos Tárkony mi volas esprimi mian dankon pro la nova rubriko, „Revuo de revuoj", per kiu li konatigas min kun la enhavo de multaj revuoj, kiuj por multaj ne estas akireblaj. Ankaŭ la artikolojn d-ro István Szerdahelyi mi ŝatas legi pro la instruplenaj ekzemploj pri lingvistiko. Kun sinceraj salutoj: d-ro Martin Schüler, 1532. Kleinmachnow, Heidefeld 132. DDR.

*

Mi estas komencanto en la Esperanto-lingvo, sed mi diligente legas Vian revuon. Mi trovas en ĝi tre multajn interesajn verkojn, kiujn mi scias legi jam bone. Min ĉefe interesas la artaparto: Nia ekslibris arto, kaj modernaj grafikaĵoj. Mi tre ŝatas ĉi tiun revuon, ĉar ĝi estas altnivela, kaj multflanka. Mi deziras al Vi bonan laboron kaj tre multajn rekonojn! — *József Rabi*, Székesfehérvár, Mikszáth u. 10.

*

„*Estimata redakcio*! — Kiel entuziasma leganto de via eksterordinara, bonega revuo „Hungara Vivo", mi proponas al vi kelkajn temojn, kiujn vi eble volas tuŝi en iu en la venontaj numeroj de HV. Ekzemple: 1. Pri tiu restoracio ĉe la piedo de la Elizabet-ponto, kiu nomiĝas „*Mátyás pince*", la plej ĉarma, pitoreska, belega restoracio. Plue: bonvolu skribi ankaŭ pri restoracio „*La Apostolo*". Mi ankaŭ forte memoras la Vien-stilan kafejon: „*Vörösmarty*". 2. Rakontu iom pri la ĝenerala opero-repertuaro en Budapesto. Mi ekz. travivis en la budapeŝta operejo neforgeseblajn prezentadon de la ritme sugestia opero, la mondfama „*János Háry*" de *Zoltán Kodály*. Ĉu vi de tempo al tempo prezentas operojn de Wagner? 3. Rakontu ekz. pri la t. n. „*Zoltán Kodály-skolo*" en la muzikinstruado. Volonte ĝenerale pri la koncerta vivo en via lando aŭ en via ĉefurbo. 4. Mi legis en la sveda fakrevuo por muzikistoj, ke Hungario estas la sola lando en tuta Europo, kiu flegas la t. n. „*vivantan restoracian muzikon*", kaj provas eviti la gramofonmuzikon. Do, interese aŭdi iom pri la hodiaŭa situacio ekz. de la mondfamaj „ciganorkestroj". Mi mem profesie muzikas (trombonisto). Akceptu de mi la plej korajn salutojn kun ĉia bondeziro pri pluaj sukcesoj por mia karega „Hungara Vivo". Sanon kaj feliĉon por ĝia redakcianaro! Via sincera sveda amiko: *Bertil Englund*, Box 9317, *S-54103 Skövde, Svedio.*"

(Ni tre dankas vian karan leteron kaj bondezirojn, proponojn. Pri kelkaj temoj ni jam skribis, pri aliaj ni klopodos raporti en niaj sekvontaj numeroj. Dankon ankoraŭfoje, kaj ĉion bonan ni deziras al vi.)

Bonvolu sciigi min, ĉu oni ankoraŭ eldonadas la belan revuon, Hungara Vivo. Hazarde mi ricevis unu solan ekzempleron. Via tre eleganta revuo min impresiis kiel alte interesa, samtempe kun grandega kultura kaj eduka valoro. Tia impona revuo fortege antaŭen puŝas nian celon — ke Esperanto estu la lingvo de internaciaj kontaktoj, kun samtempa reciproka estimo de la popoloj, kaj plifirmigo de la mondpaco. Ĉu via revuo estas abonebla senpere de via oficejo? Ĉu estas havebla malnovaj jarkolektoj? Kun alta estimo kaj amikeco al vi kaj al la hungara popolo, — via sincera usona amiko Eugene B. Stephens, Kanawha Village 31, Willows, Calif. 95988.

*

Mi penis diversmaniere ordigi abonpagon, sed tio al mi ne sukcesis. Mi volas prezenti jenan proponon, se tio vin kontentigos. Kiel vi scias, ĉe ni produktiĝas altkvalitaj rememor-suveniroj kun sukcena enkompanaĵo. Al mi estas plej konvene rekompensi abonŝuldon per egalvalora artaĵo. Per sekvonta HV mi atendas vian opinion. Vl. Kazlauskas, Litova SSR, Kaunas, Varpo 21 — I.

Korespondi deziras

Krzysztof Garncarz, Pollando, Dobridzien, Pow. Lubliniec, Skr. Poczt. 9. 20 jara. Naturo, vojaĝoj, poŝtmarkoj.

Maryte Urbanavičiute, USSR, Litovio, Vilnius-9 str. Algirdo 2/22—65. 20 jara studentino. Bildkartoj, insignoj, literaturo, turismo.

Grajina Grabeĵite, USSR Litovio, Vilnius-9 str. Basanavičius 26—2. 20 jara studentino. Bildkartoj, insignoj, diskoj.

N. B. Joisar, Bhanushaliwad, Timbafali, Jamnagar. Gujarat State, India. 29 jara. Muziko, literaturo, vojaĝo, sporto, bk.

Shri Ramsingh C. Bhatti. 9-Manhar Plot, Sudebar's house, Rajkot. Gujat state, India. 30 jara. Sport, literaturo, bk.

Tibor Pajor, Hungarujo, Esztergomtábor, Bocskai-sor 72. Komárom m. 22 jara. Akvaristiko.

István Molnár, Hungarujo, Kazincbarcika, Hegyköz 6. 42 jara. Popolkutimoj, anekdotoj, pm.

Hans Simre, 14 jara. ESTONA SSR. str. Pardi 42, Pärnu. Kemio, geogr., historio, pm., alumeta etikedo, monero.

Czestaw Grzenkowicz Lewino, Pollando. pta Strzepcz pow. Wejherowo woj. Gdanckie. Popolmuziko, turismo, sporto, pm. bk.

Tadeusz Kozieradzki, Kosierady-Kolonia. Pta. Rozhity Kamien pow. Sokotow Podl. — 20 jara. teknikisto. Literaturo, sporto, turismo, muziko, bk.

Waclava Mamet, Rogoźno Wlkp. ul. Dworzec 4 woj. Poznan, Pollando. 16 jara lernantino, filmo, sporto, bk. pm.

Wieslaw Pisavski, Skarzysko-Kam. ul. Gvaniczna 28/30. woj. Kieleckie, Pollando. 18 jara lernanto. Muziko, sporto, filmo, bk. pm.

Andrzej Woźniak, Nowy Mazowiecki, ul. Warszawska 15/47, Pollando. 20 jara studento. Teatro, filmo, muziko, popolkutimoj.

10 gekursanoj Esp. Sekcio. Deutscher Kulturbund, DDR — 27 Schwein, Wiilhelm-Pieck-Str. 8.

Geinstruistoj kaj gelernantoj de agrikultura teknikum. Litovio, USSR, Joniskelis, Teknikumo, Internacia Klubo.

Klubanoj en Ukraina urbo. Centra E. Klubo. Lenina 159. Zaporozhie — 33, Ukrainio.

Ĉu vi ŝatas HUNGARAn VIVOn? Rekomendu ĝin ankaŭ al viaj amikoj!

HUMURO

En la frenezulejo vizitanto alparolas flegaton, kiu laboras en la ĝardeno kaj plukas fragojn:
— Ĉu vi kutimas sterki la fragojn?
— Ne — respondas la flegato —, mi surŝutas sukerpulvoron. Sed mi estas ja frenezulo.

*

La religio-instrua pastro demandas Paŭĉjon:
— Diru, fileto, kio estos, se oni malobservas unu el la Dek Ordonoj?
Paŭĉjo respondas senhezite:
— Restas naŭ.

*

La instruisto vokas respondi Paŭĉjon:
— Pruvu al mi, ke la Tero estas ronda.
— Sed oĉjo instruisto — diras Paŭĉjo —, tion mi neniam asertis.

*

Oni demandas la skoton, kial li aĉetis al sia amikino ruĝan lipfarbon por nomtaga donaco.
— Tial — li respondas —, ĉar ĝi estas sola donaco, kiun iom post iom, en etaj detaloj, mi rericevos de ŝi.

*

La kvarjara Manjo tre malbone kondutas kaj ŝia patrino ŝin minacas interalie per tio, ke ŝi interŝanĝos ŝin por bona infano.
— Tio ne estas ja ebla — diras Manjo.
— Kial ne?
— Nu, kiu estos tiel stulta, ke li donu bonan infanon por malbona?

*

La patro ial trabatas sian filon kaj ĉi tiu blekas terure. Fine la patro moliĝas kaj komencas lin konsoli.
— Nu, ne ploru. Kredu, ke al mi tio doloras multe pli.
— Jes — palpas la knabo plorante la postaĵon —, sed ne en tiu sama loko.

*

En la tria klaso de la ĝenerala lernejo du knaboj interparolas dum la lerno-horo. La instruisto, rimarkinte tion, admonas ilin severe, poste punas ilin per tio, ke ili ambaŭ devas skribi centfoje sian nomon.
— Sinjoro instruisto, mi petas, tio ne estas justa puno — diras unu el la knaboj plore.
— Kial?
— Ĉar lia nomo estas Pál Kis, kaj mia nomo estas Aladár Tótkomlósfalusy.

*

— Mi kredas la metempsikozon, amiko! Antaŭe mi estis azeno.
— Kiam?
— Kiam mi pruntis al vi tricent forintojn.

*

La milionulo mortas kaj energie frapetas sur la ĉielpordego. Sankta Petro malfermas la pordegon kaj demandas, kion li volas.
— Eniri.
— Ej, ĉu vere? Kaj ĉu sube vi plenumis bonfarojn?
— Kompreneble. Foje mi donis dek cendojn al almozulo.
— Kaj poste?
— Aliafoje al alia almozulo mi donis dek cendojn.
— Kaj poste?
— Post kelkaj jaroj ree mi donis al almozulo dek cendojn.
Sankta Petro raportas la aferon al la Eternulo. La Eternulo lin elaŭskultas kaj diras:
— Redonu al li tridek cendojn kaj li iru en la inferon!

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ČEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo!

Poeto al poeto



ALEKSANDR LOGVIN verkis antaŭ kelkaj jaroj la poemon: „AL JULIO BAGHY" Ni citas la finajn kvar versojn en la vicoj: 1. kaj 19. vertikalaj, 1. kaj 52. horizontalaj.
Sendu al ni la solvon de la citaĵo.
Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj: 13. Favora al libero kaj toleremo en sociaj aferoj, 14. . . . -mašino:mašino por prilabori metalon, 15. Bleki (kiel strigo aŭ lupo), 16. Trinkaĵo, 17. Imagi tion, kion oni forte deziras, 19. Granda rusa poeto (Aleksandr Sergejevič, 1799—1837), 20. Reen: fotografi, 22. Rapida sinjeto, 24. TO, 25. Plenda ekkrio, 26. Fratino de patro aŭ patrino, 27. Franca romantika verkisto, (Eugene, 1804—1857), 28. Prepozicio signifanta disdividon, 31. Persona pronomo plurala, 32 .Konsonantoj de LANDO, 34. Valora metal', 35 Sufikso por formi nomojn de instrumentoj, aparatoj aŭ organoj, 36. SO, 37 Situacio, 39. Ĥemia element', halogeno, 41. Sufikso por formi unusencan esprimon anstataŭ „biliono, triliono", ktp. (Du . . . = biliono), 43. Muzulmana ŝtatoficist', 45. Perforta disigo, 47. Konstruaĵon, 49. Infanmanĝanta legenda gigan. to 50. Protekte proponi (nur radiko).

Vertikalaj vicoj: 2. Miksita ilo ! ¡(Oleo en angla lingvo), 3. Blanka, malmola substanco, materio de dentegoj de elefanto, 4. Aparat' por transsendi voĉon, 5. Reen: malo de ino, 6. Ĥemia simbolo de masurio, 7. Persona pronomo plurala, 8. Galiumo, 9. Sciigo presita sur papero, gluita sur muro, 10. Reen: teg'de grajno en certaj fruktoj, 12. Densigita stato de oksigeno, 16. Grasa substanco, eltirita el lakta kremo, 18. Verba finaĵo en pasinta tempo, 21. Fakulo de industria produktado, 23. Finaĵo por estanta tempo, 28. PT, 29. Reen: Nedifinita persono, 30 Oficejo de urba konsilantaro, 33. Numeralo, 36. Densa, dolĉa kuirita solvaj', 37. Pola urbo, 38. Numeralo, 40. Longa, mallarĝa leda stri', ligil', 42. Emeriko — en la hungara lingvo (baptonomo de Madách, verkisto de „Tragedio de l'homo"), 44. Argilbriko, 46. Bird'el klaso de grimpuloj, „doktoro de arboj", 48. Akvamas' leviĝanta kaj refalanta ĉe supraĵo de maro, lago aŭ rivero, 50. Radiumo, 51. KA.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo, aperinta en Hungara Vivo No. 3/1970 tekstas:

Ni do konstruu sen šancelo
tiun palacon de la Belo.
Por kiuj fundament' surfičas,
nu, tiuj loĝu en la kelo!"
(Kalocsay: La fundamento kaj la palaco)

El la solvintoj gajnis libropremion: H. Monrad Shristensen, Sommersted centralskole, DK—6560 SOMMERSTED: Danlando: Jürgen HAMANN, 705 — Leipzig, Püchauer str. 3. DDR.; József Lőrinczi, Miskolc. III. Vas u. 11. Hungario.

Edvin de Kock:

KVIN ELEMENTOJ

Poezia verko 55 pp.
Poemaro kaj prozeroj 103 pp.

Aŭtoraj eldonoj, 1970. Fotopresitaj, desegnitaj kovriloj. Mendeblaj ĉe la aŭtoro, POB 22, Somerest West, C. P. Sud-Afrika Respubliko.

Legantojn de ĉi poemvolumoj ĝojigas neofta plezuro: vera, sangplena poezio, moderna tono, formriča arto. „Freŝkante trili aŭdindas ĉiam" asertas *de Kock* plene prave, estante jam unu el la elstaraj modernaj E-poetoj, kompareblaj eĉ en la internacia poezio. Lirika epopeo, kiel la *Kvin elementoj* — iom parenca al Infana Raso de *Auld* — apenaŭ estus ĝuebla por moderna homo, se ne alkatenus nin la ravavoĉa vortofluo, la energia tajdo de pensoj. Lia „angora vivdeziro", sopiro al la Mediteraneo igas lian kanton arde freŝvoĉa, kie gravas pleje la enhavo, fruktoj de impresema intelekto, lirikeco digestinta sian mondon. Estis Auld, kiu forte instigis eldoni ĝin (pretan jam en 1958 !), tamen la longe hezitinta poeto nur nun prezentis tiun veran ĉefverkon de la moderna branĉo de E-literaturo.

Spirita soleco por la poeto en la Sud-Afrika Respubliko, foreco de ĉia nuntempa centro de ideo-fluoj bedaŭrinde senteblas en la verkoj, precipe en la *Poemaro:* ideaj zigzagoj ne malestas, foje perturbas eĉ la internan ekvilibron, malutilante al nia ĝuo. Liaj cirkonstancoj komprenebligas la ĉieŝveban pesimismon, tamen, feliĉe, la nenien gvidanta sen-elir-ideo ne reliefiĝas troe. Estas probable, ke lin atingas nur torditaj informoj pri socialismaj ideoj, idealoj kaj realoj; do ni ne kulpigu pro ĉi-koncernaj eraroj tiun sinceran poeton, cetere absorbitan de demokratismo, de homa frateco.

De Kock suverene, mirinde trafe utiligas la eblojn de Esperanto por bunte kaj poezie-klare prezenti sian direndon. Ŝajnas al mi, ke lia fortega komuniko-deziro kaj ia natura versemo de meditema menso estas la ĉefaj faktoroj de lia talento. Kuraĝaj, spritaj vortkreaĵoj, lingvaj perloj abundas en la varie multaj versformoj, kiuj servas nur por vesti la seriojn da metaforoj, pensigaj bildoj kaj profundsencaj komparoj, havantaj ofte specialan Afrikan aromon. De Kock alportas gamon de la modernaj, aliformiĝintaj poetikaj iloj, facile versas libere kaj ritme, kun kaj sen rimoj — plejparte sukcese kaj efikplene, do atingas plaĉon. Kaj kio alia gravus?

La poste verkita Poemaro havas pli da valor-diferencoj en si, pliiĝis la koncepto-kirliĝo, tamen troviĝas neforgeseblaj poemoj (Atako). Ne seninteresaj estas kelkaj, kvazaŭ versigitaj eseoj, malpli poemoj, kvankam spritaj. Oni atendu, post ideologia enhaveniĝo de la poeto, ankoraŭ multe pli de lia granda talento.

Ervin Fenyvesi

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5 • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

TANNIMPEX

Eksportas la hungarajn ŝuojn de eminenta kvalito,
elegantajn peltmantelojn
kaj unuaklasajn, laŭmodajn gantojn
kaj led-galanterivarojn

TANNIMPEX

BUDAPEST, VI. VÖRÖSMARTY UTCA 35.